

1980 marto

73-a jaro

n-ro 891 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

V-4252/73 118801

日本エスペラント学会創立60周年記念講演会



Tokio: Oni malfermas la pordojn

Vi trovos,

ĉi tie dekstre, en la sepa linio de la revuaj ĝeneralajoj, ke oni legas ĉi tiun revuon en 91 landoj. Pri kiuj 91 temas, rigardu sur la paĝo 58 (membrostatis- tiko por 1979). Ni do proksimiĝas al cento. Verŝajne unuafoje. Ĉar, antaŭe ne ekzistis tiom da landoj. Ili ofte naskiĝas en la lastaj jardekoj. Foje eĉ inter niaj du sinsekvaj numeroj (Saluton vi tie en Zimbabvio aŭ Zimbabvo!). Sed, gravas tiu geografia distribuo de la legantaro. Gravas ĝi ne malpli ol la nom- bro legantara. Ĉu ni sukcesos kompletigi la centon antaŭ la centa naskiĝtago de la lingvo en 1987? Ni provu, ĉar ni povas sukcesi, precipe se vi ĉiuj iom kunhelpas. Reen nun al ĉi tiu numero: Ni planis sendi ĝin al vi en la Nordo antaŭ ol malfermiĝos la burĝonoj en via ĝardeno, kaj al vi en la Sudo, pli frue ol aŭtuna kolormaturo ornamos vian ĉirkaŭon. Jes, sed. . . Nu, ni ne parolu pri tio. Skribu do al ni pri viaj aŭtuno aŭ printempo, se vi nenion faras por la Movado kaj sekve ne havas novaĵojn komunikendajn. Ĝuu la vivon almenaŭ!

Enhavo

- 41 Kio okazas en Kubo?: Alta tajdo en la Kariba Maro (Simo Milojević)
- 42 Landa agado: Tetasa tempesto (22a Aŭstralia Kongreso de Esperanto)
- 43 Informado: Japanoj festas publike (Joŝimi Umeda)
- 44 Iniciatoj: Ekvinokso — Tago de la Tero (H. Tonkin)
- 45 Faka agado: Necesas ŝanĝi taktikon (N. Nikolov); Hungario: Parlamen- ta komisiono traktis Esperanton
- 46 Reeĥe al "Esperantologiaj studoj" de Wüster: Esperantologio kaj lingvistiko (S. Bakrin)
- 49 Kalendaro: Kien iri? Kion fari? (Internaciaj Esperanto-aranĝoj en la periodo aprilo — aŭgusto 1980)
- 51 Recenzoj: "Pri lingvo kaj aliaj artoj" (Constantin Dominte); "Danai Vraila" (Mauro Nervi); "Elektitaj fabeloj" (Vladimir V. Samodaj; "Danĝera ul'" (Wouter F. Pilger); "Esperanto laŭ la patrina metodo" (Richard Schulz); "Hungaraj fabeloj" (Cobi Pothuizen)
- 54 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 55 TEJO-paĝo: "Ni devas vendi!" (pri Esperanto-Junularo Zuriĥo); La tria JERB (Junulara Esperantista Renkontiĝo de Brazilo)
- 56 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 57 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 58 La membraro de UEA en 1979 (laŭlanda membrostatisiko)
- 59 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

Iam, antaŭ multaj jaroj, antaŭ epokoj (kiel dirus la nuna prezidanto de UEA), la redaktoro de ĉi tiu revuo okupiĝis pri "Kontakto", revuo de TEJO. Ĉar la redaktoro — juna tiutempe — havis flugilojn, kiel ĉiuj junaj homoj, "Kontak- to" tiam havis ne nur la kovrilon, sed ankaŭ "malkovrilon". Nu, jen tia "mal- kovrilo" nun sur la kovrila paĝo de ĉi tiu revuo. Kiel ni priskribu la kovrilan bildon? Kian klarigon ni donu precipe al tiuj, kiuj ne kapablas legi japane? "Oni" estas la ŝlosila vorto sur la kovrilo. Japana Esperanto-Instituto festis la 60an datrevenon de sia fondiĝo kaj invitis kelkcentojn da "oni" — nekonataj ekstermovadaj homoj, kiuj interesiĝas pri la Internacia Lingvo. "Oni" venis amase. Vidu sur la kovrilo. Tie aperas almenaŭ cento da japanaj nukoj. Se vi nepre volas scii, kiuj vizaĝoj kaŝiĝas malantaŭ tiuj nukoj, rigardu la foton sur la paĝo 43. Ĝi almenaŭ parte solvas la enigmon. Se ĝi entute estas enigmo? Kial ĝi estu? Kial necesas ĉiam vidi la vizaĝojn? Kial senĉese pozi antaŭ la fotistoj? Kial ĉiam ŝminki la vizaĝon per rideto? Eĉ en "El popola Ĉinio" la homoj ne plu senĉese ridetas sur la fotoj. La Movado estas serioza afero.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esper- anto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jar- libro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool- singel 93, 3012 AE Rotterdam (kon- to n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj eksteraj rilatoj: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefo- no (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona aga- do: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mi- lanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Alta tajdo en la Kariba Maro

”KURSFINA ARANĜO: Ĝi okazos la 2an de februaro en la teatro Hubert de Blanck... Ĉirkaŭ 500 gelernantoj ricevos sian ateston de enkonduka kaj meza niveloj... La 11an de februaro 1980 komenciĝos la nova kurso por la tri niveloj. En ĝi partoprenos pli ol 1000 gelernantoj... Jam fondiĝis Esperanto-rondoj en Güines, Ciego de Avila kaj Pinar del Rio, kaj baldaŭ fondiĝos en Santiago de Cuba. Delegitoj de KEA jam funkcias en... Guaimaro, Cienfuegos, Isla de la Juventud, Placetas, Cárdenas, Agramonte, Sta Clara, Ciego de Avila, Banes, Güines kaj Santiago de Cuba, kaj ankaŭ en la internaciisma labortacimento laboranta en Libio.”

Ĉio ĉi-supre estas nur parto de la novaĵoj el la modesta, unupaĝa, *Kuba bulteno*, oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio, numero de februaro 1980. Facilas konkludi, ke tian svingon la Movado lastatempe havis (kaj ŝajne ankoraŭ havas) nur en Irano. Kial subite tia vervo pri Esperanto en lando, kiu jam en 1907 havis Esperanto-societon en Santiago de Cuba, kaj ŝajne eĉ pli frue (en 1904?) sian unuan Esperanto-gazeton (*Escritura Veloz*), kiun poste sekvis *Kuba stelo* kaj *Cuba Esperantista*? Kio klarigas la novan entuziasmon pri la Internacia Lingvo, se Kuba Societo por la Propagando de Esperanto fondiĝis jam en 1910, kaj post reorganiziĝo en 1913 aktivis dum jardekoj, tiel ke en 1928 esperantistoj troviĝis en 43 urboj de tiu lando?



Ambasadorino de Kubo en Svislando, Marta Jiménez Martínez, salutas en Lucerno. (Interpretas A. Díaz el Britio)

Almenaŭ provizora respondo al tiuj demandoj devus esti la oficialigo, ŝtata rekono de Kuba Esperanto-Asocio. Tiu landa organizaĵo fondiĝis jam en 1974, sed ĝi oficiale ekfunkciis nur la 16an de junio 1979. En tiu tago okazis fondkunveno, kiun ĉeestis i.a. d-ro José A. Bustamente, vicprezidanto de Scienca Akademio de Kubo, en kies kadro KEA funkcias ne nur organize sed ankaŭ fizike, ĉar la oficejo de la Asocio ŝajne troviĝas en la konstruaĵo de la Akademio.

Tuj post la oficialigo de KEA venis la unuaj informoj pri tiu evento. Ni skeptike rilatis al ili, ĉar tro ofte dum la pasintaj kvin jaroj atingadis nin komunikoj, ke la oficialiĝo estas tre proksima. Plena konfirmo de la novaĵo atingis la Kongreson en Lucerno pere de ekscelenca heroldo: tie la informon komunikis mem la ambasadorino de Kubo en Svislando, Marta Jiménez Martínez.

En septembro pasintjare en la kuba ĉefurbo Havano ekfunkciis du bazaj kursoj de Esperanto, kun 900 gelernantoj kaj unu daŭriga kurso kun 120 partoprenantoj. Pro komprenebla manko de la necesa kvanto de lernolibroj kaj vortaroj, oni jam tiutempe planis represon de la dudirekta poŝvortaro hispana, tiu de la eldonejo Sopena. Ankaŭ UEA klopodis helpi kaj sendis al Kubo diversajn librojn en la valoro de ĉ. mil guldenoj. Certe bonvenas plia tiurilata helpo, kiun oni povas adresi al: Kuba Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 314, Habana 1. Se mankas al vi disponeblaj libroj, vi ĉiam povas sendi monkontribuon al UEA, kun peto uzi la sumon por sendi librojn al Kubo.

La Esperanto-movado en Kubo estas junulara: ”Kiam mi telefonis al esperantistoj, ili tuj venis al la hotelo por saluti min. Ili flue kaj bone parolas la lingvon; tamen, ĉiuj estas junaj...”. Tiel skribis al ni pasintjare J. Delpino, UEA-delegito en Nov-Jorko, kiu entuziasmis pri sia vizito al Kubo. Ne malpli entuziasme raportas pri sia kuba vojaĝo, fine de 1979 kaj komence de 1980, la geedzoj Bossong el Nederlando:

”Nu, oni povas diri, ke tie nun regas tre favora etoso por Esperanto... Estante en Havano ni ĉiutage havis kontakton kun esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj el ili tre bone regas la lingvon, eĉ Juan Besada (26-jara), kiu nur en aprilo pasintjare eklernis la lingvon. Li kaj René Valdés (31-jara, vicprezidanto de KEA), vere brila esperantisto, havas gvidajn funkciojn en la kuba Komitato pri Instruado. Funkcias nun 20 kursoj, kun proksimume 550 gelernantoj. La nombro de lernantoj estas limigita nur pro la manko de instruantoj kaj instrumaterialo. Pro tio ĉiu ĝojsaltis, kiam ili vidis la por ili valoregajn librojn kaj alian materialon donacitan de kelkaj esperantistoj en nia vojaĝgrupo. Valdés nun preparas lernolibron por komencantoj kaj ĝi verŝajne estos eldonita ĉi-jare.”

En la raporto de Katrin kaj Ru Bossong troviĝas ankaŭ informo pri alia malofta utiligo de Esperanto: ”La 3an de januaro ni organizis en nia hotelo ’Nacional’ specon de konferenco kun kubaj esperantistoj kaj 25 nederlandanoj el nia 33-persona vojaĝgrupo. Dum du kaj duona horoj la kubanoj respondis al ĉiaspecaj demandoj de la neesperantistoj, pri la kuba socio, eĉ pri la stato de Esperanto. Ni tradukis la demandojn kaj respondojn. Laŭ la neesperantistoj, la vespero estis unu el la plej bonaj kaj plej informriĉaj aranĝoj de la tuta vojaĝo.”

Ni revenu nun al la freŝe — kaj finfine — oficialigita Kuba Esperanto-Asocio kaj la februara numero de ĝia

Kuba bulteno. Ĝi informas, ke "Esperanto-Tago" (ĉu temas pri Zamenhof-Tago?) "brile sukcesis"; ĝi komenciĝis per parolado de inĝeniero Andrés Rodríguez, prezidanto de KEA, kaj poste, interalie, "ĉirkaŭ 300 partoprenantoj dancis ĝis frumattene...". Tie oni legas ankaŭ pri la "farendaj taskoj en 1980": daŭrigi la 3-nivelajn Esperanto-kursojn; komenci korespondan kurson; fondi Esperanto-rondojn en lernejoj, laborejoj, kulturdomoj ktp.; fortikigi la laboron de ĉiuj komisionoj kaj de la sekcioj junulara kaj scienc-teknika; ellerni la lingvon. Tio estas la tuta publikigita listo de la taskoj, inkluzive de tiu lasta tasko, tiel bele formulita, koncernanta ĉiujn.

Necesas fine reveni ankaŭ al nia propra malnova opinio pri la graveco de la loko, kiun landa Esperanto-organizaĵo okupas en sia propra socio, en la koncerna ŝtata strukturo, se vi tiel volas. Supozeble, la oficialiĝo de KEA prokrastiĝis tiel longe, ĉar ĝi ne estis la sola afero pri kiu devis okupiĝi la koncernaj ŝtataj aŭtoritatoj. La fakto, ke KEA oficialiĝis en la kadro de Scienca Akademio de Kubo, donas al tiu Esperanto-organizaĵo tuj dekomence prestiĝon kaj aŭtoritaton enlande. Pri tio la movadaj organizaĵoj en la plimulto de landoj devas ankoraŭ longe batali el siaj socia izoliteco kaj privateco. Ni diras tion antaŭ ol leviĝos denove tiuj gurdaj demandoj pri la memstareco kaj suvereneco de niaj landaj organizaĵoj. Vidu, io mirinda okazas en Kubo: miloj da gejunuloj



Supre: Nederlandaj turistoj konferencas kun kubaj esperantistoj.

Dekstre: J. Delpino inter du movadanoj en Havano.



entuziasmas pri Esperanto kaj lernas ĝin. Ili faras grandiozan laboron el nenio, sen instrumaterialo, sen multa ebleco de internaciaj vojaĝoj, sen kontinua sperto en la historio de la landa Movado. Ili sukcesas, ni dirus, ĝuste pro la fakto, ke ili estas konsista parto de la socio en kiu ili vivas kaj agas. Tial ni ne povas legi en *Kuba bulteno*, ke mankas ejoj por la Esperanto-

LANDA AGADO:

Tetasa tempesto

"Tempesto en taso da teo" nomiĝis unu el la teatraĵoj prezentitaj dum la 22a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, okazinta inter la 2a kaj 9a de januaro 1980 en Sidnejo. Ni emas nomi tiel la tutan kulturan fakon de la Kongreso. Laŭ la movadaj spertoj, estas apenaŭ kredeble, ke en kongreso kun nur iom pli ol cent partoprenantoj oni trovas homojn por prezenti dekon da teatraĵoj kaj skeĉoj. Tio pli-malpli signifas, ke la plimulto de la ĉeestantoj almenaŭ foje aktoras sur la scenejo. Inter la rolantoj troviĝis ankaŭ Ralph Harry, antaŭa ambasadoro ĉe UN kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, samkiel prof. R. Robertson, prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA). Temis fakte pri tradicia drama konkurso, kutima en la aŭstraliaj E-kongresoj. En du teatraj vesperoj konkurso ok grupoj. La plej bonaj montriĝis esti tiuj el Manly kaj Brisbane. Se oni al ĉio ĉi aldonas, ke dum aliaj du vesperoj prezentigis pliaj skeĉoj kaj eĉ tuta farsa opero (*La Mikado* de W.S. Gilbert kaj A. Sullivan, tradukita de Gaye Phillips) per komuna streĉo de la kluboj el Brisbane, Sidnejo kaj Melburno, oni ne miru, ke ni al ĉi tiu raporto donas tempestan titolon.

Dum la kongreso oni aŭdis dek prelegojn kaj havis la kutiman kvanton da organizaj kunsidoj kaj raportoj. Kiam venis la vico de elektoj por la nova estraro de Aŭstralia Esperanto-Asocio, aŭdiĝis almenaŭ ses proponoj pri la prezidanta posteno. Tamen, la ĝisnuna prezidanto, prof. R. Robertson, konsentis plenumi la taskon dum plia duonjaro, kiam la gvidan rolon verŝajne transprenos Ralph Harry, kiu intertempe estas unu el la vicprezidantoj. En la kongresa inaŭguro parolis senatano C.V.J. Mason, kaj inter la gastoj troviĝis ankaŭ la japanino Majo Isobe. Audrey Childs-Mee, Cseh-metoda instruistino el Britio (nun loĝanta en Nederlando), fariĝis honora membro de AEA, pro la sukcesaj kursoj en Aŭstralio komence de 1979. Ŝajnas, ke la Asocio fartas bone ankaŭ finance, kvankam ni eble konfuziĝis pro la amaso da fondaĵoj, kies nombron oni eĉ planas pligrandigi. La ĉefa problemo de la Movado en Aŭstralio ŝajnas esti tiu, kiun spertas ankaŭ aliaj landaj organizaĵoj (precipe en la okcidenta Eŭropo) — alta aĝo de la membraro. En Aŭstralio, tamen, iom da gejunuloj alfluas, kaj pluraj el ili jam aktive rolis en la sidneja kongreso. Aŭstralia Esperanto-Asocio ne apartenas al la plej amasaj landaj organizaĵoj, sed ĝi certe troviĝas inter la plej viglaj. Samtiel, ĝia revuo *The Australian Esperantist*, al kiu ni ŝuldas la informojn por ĉi tiu raporto, delonge viciĝas inter la plej bonaj landaj Esperanto-periodaĵoj.

kursoj, ke mankas financaj rimedoj por pagi la materiajn kostojn de tiuj kursoj. Pagas eble la Akademio, la ŝtato — se vi tiel volas —, ĉar Kuba Esperanto-Asocio estas integra parto de la kuba socio. Ĝi certe baldaŭ fariĝos integra parto ankaŭ de la internacia Esperanto-Movado, ĉar la Internacia Lingvo ne havas multan sencon en nacia kadro, sen internacia kunlaboro. Tial ni ĉiuj ĝoju pro la alta Esperanta tajdo en la Kariba Maro.

S. Milojević

Japanoj festas publike

Lastatempe ni plurfoje atentigis pri la intenseco kaj kvalito de la informa laboro en Japanio. Apud Britio, kie la informado pri Esperanto ĉefe direktiĝas al la parlamenta kaj sindikata medioj, Japanio ekzemplas sur ĉi tiu agadkampo. Laŭ nia scio, ne ekzistas alia lando, kie oni publikigas tiel multe da nacilingvaj informiloj kaj libroj pri Esperanto, kiel okazas en Japanio. Nova dimensio en tiu intensa informado estas la publikeco de aranĝoj kaj solenaĵoj, kiuj en aliaj landoj plejofte restas en fermitaj movadaj rondoj.

”ESPERANTO estas lingvo vere mirinda kaj majstra, kiun mi volonte lernas kaj subtenas.” Tiel konkludis sian prelegon Hisasi Inoue, unu el la plej popularaj verkistoj-dramistoj en Japanio (v. ankaŭ nian n-ron de okt. 1979, p. 162). S-ro Inoue prezentis sian ”Vidpunkton pri internacia lingvo” kiel titolon de la japan-

lingva prelego, aranĝita memore al la 60-jara datreveno de la fondiĝo de Japana Esperanto-Instituto, la 16an de decembro 1979.

La kunvenon ĉeestis pli ol 300 personoj, superante la oficialan kapaciton de la salono en la centro de Tokio. La prelegkunvenon kunorganizis la Informa Fakto de Japana Esperanto-Instituto kaj la redakcio de *La mondo de Esperanto* (japanlingva pri-Esperanta revuo), redaktata de K. Kurisu. La kunvenon favore anoncis deko da taggazetoj kaj semajnevuo influhavaj tra la japana metropolo, tiel ke du trionoj de la kunvenintoj estis ne-esperantistoj.

”Internacia komunikado kaj lingva problemoj” estis la titolo de alia prelego, prezentita de prof. Douglas Lummis, usona fakulo pri politika ideologio, instruanta ĉe Tuda Universitato en Tokio. Kvankam li ne scias multon pri Esperanto, surbaze de sia multjara sperto pri anglalingvaj komunikado kaj instruado en Japanio, prof. Lummis substrekis, ke la japanoj ĝenerale devos trovi solvon pri lingvaj malfacilaĵoj per alia pli trafa maniero, ol estas la uzado de la angla kiel internacia komunikilo. Lia prelego estis japanlingva, kio per si mem vekis grandan intereson.

La aranĝo montriĝis fruktodona, tiel por la organizintoj kiel por la kunvenintoj. Oni lernis pri nekonataj aspektoj de la internacilingva problemoj kaj pri eblaj solvoj. Multaj interesitoj diskutis kun prof. Lummis, eĉ post la kunveno, ĉe komuna bankedo en la Esperanto-Domo de JEI.

S-ro Inoue, aliflanke, malkaŝis ke ekde sia deklaro pri Esperanto-lernado li ricevadas kuraĝigajn leterojn kaj diversajn pri-lingvajn informojn de multaj esperantistoj tra Japanio.

Joŝimi Umeda



Hisasi Inoue (ankaŭ sur la malgranda foto) prelegas pri sia ”Vidpunkto pri internacia lingvo”, meze de decembro en Tokio.

Ekvinokso: Tago de la Tero

Kvankam ĉi tiu teksto atingis nin malfrue por aperi en iu el la antaŭaj revunumeroj, ni publikigas ĝin nun, kiel prezenton de grava iniciato, pri kiu la Movado pensu por la venontaj jaroj.

EN 1970, spronite de klarvida kaj trankvile insista pensulo John McConnell, grupo da usonanoj festis je la ekvinokso — la 21a aŭ 22a de marto - la unuan Tagon de la Tero. Ilia celo estis tre simpla kaj ilia mesaĝo facile komprenebla: la Homo heredis grandegan respondecon, nome la vartadon kaj konservadon de la propra planedo, ne nur por la nuna generacio sed por la venontaj, kaj ne nur por la propra specio sed por ĉiuj specioj.

En la sepdekaj jaroj, la Tago de la Tero emfazis precipe la homan medion, kaj la neceson decidi, kiajn kondiĉojn ni bezonas por ebligi la daŭrigon de la vivo sur la Tero. En la okdekaj jaroj, oni speciale atentis la konstaton, ke la Tero estas nia hejmo, kiun ni ĉiuj devas dividi. Oni emfazas la fakton, ke necesas elserĉi la komunajn ecojn en la homaro, tiel ke ni povu kune labori por plibonigi la vivkondiĉojn de la propra kaj estontaj generacioj.

Por forte akcenti tiun temon, okazos speciala ceremonio ĉe Unuiĝintaj Nacioj la 20an de marto 1980. Je 11h10, Greniĉa Tempo, oni sonorigos la Sonorilon de la Paco ĉe UN. Kaj oni invitas ĉiujn homojn sonorigi la sonorilojn de siaj preĝejoj, temploj, urbodomoj ktp. je tiu sama momento, por iniciati momenton de silenta meditado kaj sindediĉo pri la estonteco de la Tero kaj ĝiaj loĝantoj.

Unu el la ĉefaj aktivuloj en la festado de la Tago de la Tero, la lastatempe forpasinta usona antropologo Margaret Mead, emfazis foje, ke "la preĝoj je la Tago de la Tero estas silento — kie mankas la babelo de lingvoj". UEA faras sian eblon kunlabori kun la organizantoj de la Tago de la Tero, ĉar ĝiaj celoj estas para-

Arbaro kaj urba betono, la malofta kaj ĉiam pli ofta bildoj: Kian estontecon havas la Tero?



Tiuj personoj celis, ke ĉiujare okaze de la ekvinokso la loĝantoj de la planedo Tero redediĉu sin al la konservado de sia hejmo — al la saĝa utiligo de naturaj rimedoj, la efika uzado de teknologio (sen detruo de la propra medio).

Iliaj klopodoj baldaŭ altiris mondan atenton. Unuiĝintaj Nacioj komencis ludi rolon en la ĉiujara festo, kaj la ĝeneralaj sekretarioj U Thant kaj Kurt Waldheim aliĝis al la patronaro. La fakto, ke la dato de la festo estis ligita al tutmonda, eĉ astronomia, fenomeno — la ekvinokso — ligis la tutan mondon je la koncerna tago, senkonsidere ĉu temis pri la alveno de la novaj promesoj de printempo (en la Nordo) aŭ la plenumiĝo de tiuj promesoj en la rikoltoj de la aŭtuno (en la Sudo).

lelaj al la niaj. Sed ni havas la grandan avantaĝon, ke niaj preĝoj kaj meditaĵoj povos ĉirkaŭi la globon per unusola lingvo: ne necesas silente mediti kaj esperi, ke la komunaj homaj ecoj tiel manifestiĝos, sed eblas per vortoj esprimi nian komunecon kaj niajn komunajn homajn celojn.

Ni invitas Esperanto-grupojn tra la mondo aliĝi al la festado de la Tago de la Tero, kaj konvinki ankaŭ eksterstarantojn, do neesperantistojn, kunlabori. Sonoru la sonorilojn en ĉiuj landoj dank' al la interveno de la esperantistoj! Ni volonte ricevos viajn raportojn pri agado en tiu ĉi kunligo — ĉar ĝi helpas plue konvinki la publikon pri la efikeco de niaj lingvo kaj Movado.

H.T.

Necesas ŝanĝi taktikon

ANTAŬ KVAR JAROJ mi fariĝis oficisto en "Hidrologio kaj Meteologio" en Sofio. Ĉe tiu oficejo estas ankaŭ scienca instituto. En ambaŭ laboras multe da laboristoj, oficistoj kaj sciencistoj. En januaro 1978 mi pendigis afiŝon pri kurso de Esperanto en unu el deko da E-societoj en Sofio. Dufoje mi disaŭdigis informon pri la kurso per la oficeja radiostacio. La rezulto estis nulo. Nur du personoj petis pliajn informojn kaj, kiam ili eksciis, ke la kurso ne okazos en la oficejo mem, ankaŭ tiuj du personoj rezignis pri la partopreno.

Tia malsukceso facile — kaj kompreneble — povas forigi la vervon eĉ ĉe granda entuziasmo. Tamen, mi ne rezignis pri la klopodoj organizi Esperanto-kurson tie. Mi decidis persisti.

Antaŭ ol daŭrigi la klopodojn, mi analizis la malsukceson. La konkludo estis, ke mi devas ŝanĝi la taktikon. Mi volis unue montri al la potencialaj esperantistoj la praktikan valoron de Esperanto, kaj poste organizi kurson. Por atingi tion mi aranĝis, pere de la asocio "Monda Turismo" ekskurson. Aliĝis dudek personoj. Ili vizitis Varsovion, Gdańsk, Bydgoszcz, Budapeŝton kaj Bukareŝton. La ekskursanoj spektis en Gdańsk iujn el la spektakloj de la Esperanto-teatroj el Finnlando, Francio, Jugoslavio kaj Pollando. En Bydgoszcz

oni partoprenis Esperanto-renkonton. La ekskurso estis tre sukcesa. Vidante "vivajn" alilandajn esperantistojn, partoprenante internaciajn aranĝojn, la ekskursantoj konvinkiĝis pri la praktika valoro de Esperanto kaj petis okazigon de kurso.

La kurson ni gvidis dum kvar monatoj. La lecionoj okazis en labortempo, same kiel oni en nia oficejo lernas naciajn lingvojn. La kursanoj diligente lernis kaj pere de la lernado fariĝis pli bonaj amikoj. El 25 aliĝintoj sukcese finis la kurson 20. Inter ili estas kelkaj sciencistoj. Mi klopodis liveri al ili adresojn de samfakuloj en eksterlando. En la Jarlibro de UEA mi trovis nur tri konvenajn adresojn. Anonco en la gazetaro restis senrezulta. Evidentiĝis, ke la Movado preskaŭ ne kulturas tiun ĉi terenon. Tamen, mi persistas. Ĉijare mi fondis ĉe la oficejo la klubon "Esperanto". Nun mi gvidas novan kurson por komencantoj. Verŝajne post ĝi povos okazi ankaŭ alia por progresantoj. Estas planitaj enlandaj kaj eksterlandaj ekskursoj, por viziti kolegojn, samfakulojn. Nun ĉiuj en mia oficejo parolas pri Esperanto kun estimo.

Mi surpaperigis mian Esperanto-agadon ne por fanfaroni. Mia celo estas pruvi al tiuj aktivuloj, kiuj ofte plendas pri manko de intereso pri Esperanto, ke verŝajne oni devas ŝanĝi la taktikon. Mi forte esperas, ke tiu ĉi artikolo instigos landajn kaj lokajn Esperanto-organizaĵojn ekagi inter hidrologoj kaj meteologoj. Jen nia adreso por kontaktoj kaj kunlaboro: "Hidrologio kaj Meteologio", Klubo "Esperanto", Bulv. Lenin 66, BG-1113 Sofia, Bulgario.

N. Nikolov

HUNGARIO:

Parlamenta komisiono traktis Esperanton

LA HUNGARA Ministerio pri Instruado, pere de d-rino M. Hanga (vicministro), prezentis al la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento detalan kaj favoran raporton pri la stato kaj perspektivoj de la instruado de Esperanto en diversnivelaĵoj de Hungario. Tiu raporto estis diskutita kaj akceptita dum la kunsido de la Kultura Komisiono la 14an de decembro 1979. Por kompili la raporton, la Ministerio mem vaste esploris pri la instruado de Esperanto en hungaraj lernejoj kaj pri la fono de tiu instruado. (Alian raporton pretigis la Instrua Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio, laŭ ministeria peto.) La raporto emfazas aparte pozitivan situacion en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Tie bonaj rilatoj inter HEA kaj aliaj hungaraj organizaĵoj ebligas, ke la gelernantoj spertu Esperanton ankaŭ eksterlerneje. Tian kunlaboron alte taksas d-rino Hanga, kiu, prezentante la raporton, komentis pri la neceso rilatigi Esperanton al kiel eble plej multaj soci-

aj instancoj en Hungario. En la raporto la Ministerio notas kreskantan intereson pri Esperanto kaj promesas klopodi pligrandigi la skalon de la Esperanto-instruado konforme al la nunaj bezonoj kaj eblecoj.

Diskutis la raporton — konsente sed kun diversaj emfazoj — lingvosciencistoj, esperantistoj kaj deputitoj. Interalie, d-ro G. Szépe, sekciestro de la Instituto pri Lingvoscienco, esprimis la opinion, ke ĉe la progresigo de la instruado de Esperanto en la hungara edukistemo la plibonigo de la kvalito de tiu instruado estas pli grava ol la plivastigo de la leciona reto. Zsuzsa Barcsay, gvidantino de la Instrua Komisiono de HEA, pledis por enkonduko de Esperanto kiel elekta lingvo en ĉiuj hungaraj lernejoj, argumentante, ke tio kontribuos al la edukado de la lernejoj pri internacia mondkompreno k.s., laŭ la priedukaj rekomendoj de Unesko. Tio ŝparus tempon kaj rimedojn, kiujn oni sen Esperanto devas elspezi por speciala informado pri la internaciaj realaĵoj. La sekretario de HEA, T. Vaskó, atentigis, ke Esperanto havas aparte traktindan popolklerigan rolon. Responde al tiu punkto, J. Géczi, prezidanto de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento, promesis, ke la Komisiono revenos poste al la temo kaj dediĉos atenton al la kleriga kaj kultura roloj de Esperanto.

(Laŭ *Budapeŝta informilo*, januaro 1980)

Esperantologio kaj lingvistiko

EN LA LINGVISTIKAJ MEDIOJ esperantologio gastas ankoraŭ malofte. Malgraŭ favora rilato de kelkaj eminentaj lingvistoj al Esperanto, oni ne povas diri, ke esperantologio jam fariĝis plenrajta branĉo de la lingvoscienco. Ĉu esperantologio estas ankoraŭ tro juna?

Unuafoje la vorto "esperantologio" aŭdiĝis en 1921. Ĝin inventis Eugen Wüster, tiam 22-jara studento de la Berlina Teknika Altlernejo. Por la lingvoscienco tiu epoko estis markita de decida turno: kelkajn jarojn antaŭe, en 1916, aperis la fama *Kurso de ĝenerala lingvistiko* (postmorta eldono) de Ferdinand de Saussure, kies ideoj profunde influis la lingvosciencan de la 20a jarcento kaj sekvigis la aperon de novaj lingvistikaj skoloj (de Ĝenevo, de Prago, de Kopenhago, ktp).

Oni vidas, ke esperantologio estas pli-malpli samaĝa kiel la tuta moderna lingvoscienco, kaj certe ĝi havis sufiĉan tempon por ricevi agnoskon. Tamen jen la stranga situacio: esperantologio prezentas sin kiel nova branĉo de lingvoscienco — laŭ Wüster kaj Neergaard, esperantologio eksplicite difiniĝas kiel "la lingvistiko de Esperanto", p. 209 de *Esperantologiaj studoj*¹⁾ — sed ĝis nun la lingvoscienco ne pretas akcepti tiun branĉon. En la verkoj pri la strukturo de lingvistiko, esperantologio ĝenerale ne estas listigita inter la aliaj branĉoj, kaj mem la vorton "esperantologio" oni ne trovas en la vortaroj de lingvistikaj terminoj.

Multaj esperantistoj atribuas tiun malagnoskon al subjektivaj kialoj (la aludita konservativismo de lingvistoj), sed tiu klarigo estas esence erara. La ĝenerala etoso de

1) *Esperantologiaj studoj*, Eugen Wüster (1898-1977). Redaktis R. Haupenthal. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 254p. 21cm. ISBN 90 6336 005 3. Prezo: 24,00 (por Nederlando 24,96) gld., plus sendokostoj 10%.

la nuntempa lingvistiko estas nekonformisma, eksperimentema. La nombro de novaj teorioj, eĉ novaj "lingvistikoj" (socilingvistiko, pragmolingvistiko, psikolingvistiko, tekstolingvistiko) kreskis tiel multe, ke ĝi mem fariĝis obstaklo por la ordigo de lingvaj scioj. Se esperantologio tamen estas daŭre neglektata, oni klarigu tion per objektivaj kialoj.

La objektiva fenomeno, kiu diferencigas lingvistikon kaj esperantologion, estas malsameco de iliaj esplorprocedoj. Ferdinand de Saussure kontraŭstarigis du studobjektojn de lingvistiko: la **lingvo** (sistemo de signoj, konservataj en la psiko de homoj) kaj la **parolo** (teksto, en kiu signoj sekvas unu la alian). La natura lingvo neniam estas rekte observebla, ĉar oni ne povas senpere analizi la cerban mekanismon de la lingvo²⁾. La sola rimedo malkovri ties leĝojn estas la analizo de la teksto (skriba aŭ parola). Tiel, en la lingvoscienco okupiĝanta pri naturaj lingvoj, la teksto estas **primara** studobjekto, kaj la lingvo — **sekundara**. Ĉiu nova esplorita teksto povas doni al la lingvisto novan materialon, kiu devigus lin ŝanĝi la jam formulitajn hipotezojn pri la lingvo. Pro tio la lingvo (= natura lingvo) estas objekto **nelimigita**, kiun oni neniam povas priskribi elĉerpe, ĝis la fundo.

En la esperantologio la situacio estas inversa. La primara, jam dekomence konata objekto estas la (plan)-lingvo Esperanto, kiu havas **limigitan** strukturon — eĉ ne nur limigitan, sed reduktitan al minimumo: la 16 reguloj de gramatiko kaj la fundamenta vortaro. Per apliko de tiu limigita lingva strukturo oni konstruas la tekston (sekundaran objekton).

Oni do ne miru, ke la profesia lingvisto, kiu scias fari la plej subtilajn hipotezojn pri la malplej simplaj leĝoj

2) Tamen freŝdate oni vidas la aperon de ankoraŭ unu lingvistiko de la cerbo — neŭrolingvistiko (vidu: A.R. Luria. *Basic Problems of Neurolinguistics*. Mouton, 1976).

John Wells:

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Preskaŭ tuta milo da esperantistoj jam havigis al si ĉi tiun sciencon analizon de la fenomeno de la Internacia Lingvo. Ampleksa enkonduko ★ Fonetiko ★ Morfologio ★ Sintakso ★ Leksiko kaj semantiko ★ Fonetikaj simboloj ★ Bibliografio (88 croj) ★ Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld. (Ned. plus 4%)

de la lingvo, ne sentas sin logita de Esperanto, kiu pro la kelkgeneracia propagando de siaj adeptoj ricevis la aspekton de "facila lingvo kun la 16 reguloj de gramatiko". La lingvisto konkludas (tute konsekvence), ke esperantologio simple ne havas ion por esplori, kaj ne povas esti konsiderata kiel branĉo de esplorscienco (lingvistiko).

Tamen oni povas montri, ke la imago pri Esperanto kiel limigita lingva strukturo estas nur parte prava, kaj aliflanke Esperanto estas same nelimigita, neelĉerpebla kiel ĉiuj naturaj lingvoj.

Efektive Esperanto ne estas nur aro da signoj; ĝi estas signaro, funkcia socie. Tio signifas ke la limigita aro da signoj adaptiĝas al nelimititaj bezonoj de la ĉiutaga socia komunikado, kie povas ekesti tute aŭtonomaj leĝoj de Esperanto ne antaŭviditaj ĉe ĝia naskiĝo. Fakte la 16 reguloj estas nur **potencialaj** postuloj kiuj povas koincidi, kaj povas ne koincidi, kun la **efektiva** uzado.

„Esperantologio” preterlasas la funkciaŭtan lingvon

Ni prenu ekzemple la regulon 9 de la Fundamenta Gramatiko: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita". En lingvistikaj terminoj tiu regulo signifas, ke esperantaj sonoj ne devas havi pozician variadon. Tamen en realeco ĉiuj prononcas /degdu/ anstataŭ /dekdu/, /apstrakta/ anstataŭ /abstrakta/ ktp. Se oni dezirus formuli la **aktualan** leĝon de fonetika uzado, necesus diri ion similan al: "Esperantaj sonoj havu minimuman pozician variadon, kiu ne malhelpas la komprenon de la parolo".

Sama diferenco inter potencialaj kaj efektivaj reguloj regas en la semantiko (sistemo de sencoj). Laŭ la Fundamento de Esperanto la sufikso -ist- signifas personon, profesie okupiĝantan pri io (laboristo, kuracisto, ktp). Sed la uzado devias de tiu postulo, oni uzas la

sufikson ankaŭ en la ne-Fundamenta senco de "adepto, subtenanto" (pacisto, socialisto, esperantisto, ktp).

En multaj okazoj oni povas konstati ne nur malegalecon de potencialaj kaj aktualaj reguloj, sed ankaŭ ekziston de praktikaj reguloj siaspecaj, kiuj tute ne sekvas el la postuloj de la Fundamento. Laŭ la Fundamento, la sufikso -ar- signifas kolekton de identaj aĵoj (arbo — arbaro, ŝtupo — ŝtuparo). En la aktuala uzado oni plu distingas inter la nerestriktita kaj la restriktita senco de tiu sufikso. Nerestriktita: **homaro** (= ĉiuj homoj de la mondo), restriktita: **libraro** (= libroj kolektitaj en iu loko, ne: ĉiuj libroj de la mondo). En **hararo** la restriktito estas duobla: **hararo** signifas nek ĉiujn harojn ekzistantajn en la mondo, nek eĉ ĉiujn harojn de unu individua harulo; en la ĉiutaga uzo **hararo** estas komprenata en la senco "haroj sur la supra parto de la kapo" (barbo kaj lipharoj ne estas hararo!). Al tio ni aldonu ke ĉe Zamenhof **hararo** sencis "peruko".

Tiel oni vidas, ke en Esperanto kunekzistas du subsistemoj: la subsistemo de potencialaj reguloj kaj la subsistemo de aktualaj reguloj, kiuj ne ĉiam kaj ne necese devas koincidi. La unua sistemo estas elĉerpe priskribita en la Fundamento, do ĝi estas limigita. Sed la dua sistemo principe ne estas priskribebla ĝis la fino, ĉar ĝi spegulas la socian uzadon de Esperanto, kiu havas siajn proprajn leĝojn ne ĉiam konsciatajn de la uzantoj de la lingvo.

Se oni komprenas sub la nomo "esperantologio" nur la priskribon aŭ interpreton de la Fundamento, esperantologio (laŭ la prava aserto de lingvistoj) ne estas ankoraŭ esplorscienco, ĉar la vera funkcia lingvo estas preterlasata. Se, tamen, oni transiras al la analizo de aktualaj leĝoj de la socie funkcia Esperanto, esperantologio naskiĝas kiel efektiva scienco kaj meritas esti inkludita en la lingvistikon.

René de Saussure patris, Wüster baptis

Mi opinias, ke la naskiĝo de la scienc-esplora esperantologio okazis antaŭ Wüster, nome en la jaro 1910, kiam René de Saussure (frato de Ferdinand) publikigis sian faman libron *La construction logique des mots en Espéranto* ("La logika konstruado de vortoj en Esperanto"). En tiu verko, unuafoje post la apero de Esperanto, estis science montrita la fakto, ke la funkcia Esperanto obeas ne nur la Fundamenton, sed **kromajn** leĝojn, kiuj ne estas registritaj inter la fundamentaj reguloj. Temas pri la gramatika karaktero de esperantaj radikoj (fakte pri la klasoj de radikoj) kaj pri t.n. "principoj de neceso kaj sufiĉo".³⁾

La gravega kontribuo de R. de Saussure konsistas el tio, ke por starigi siajn principojn li analizis la faktan lingvouzadon de Esperanto, sekve uzis la esplorprocedon kiu normale estas aplikata al naturaj lingvoj. Kaj ĉe tiu analizo evidentiĝis, ke en la fakta uzado regas kaŝitaj leĝoj, kiujn necesas science malkovri. En la

Foto: J. Ošap



Multnacia grupo pozas dum la Kongreso en Lucerno: Provizore, esperantologio preteratentas ilian lingvouzon.

3) Vidu: *Aktoj de la Akademio 1963-1967*, pp. 55-70.

Infana Kongreseto en Lucerno:
Kiel oni akiras la kapablon pensi en la dua — negepatra — lingvo, kiel Esperanto? Aŭ, ĉu temas ĉi tie pri la unua lingvo?

Foto: T. Kehlet



Fundamento ĉiuj radikoj estis konsiderataj samrangaj; en la funkcia lingvo, laŭ R. de Saussure, la radikoj montras diversajn kvalitojn kaj devas sekve esti ordigitaj en diversajn klasojn (substantivaj, adjektivaj, verbaj ...).

Tiu elmontro, mi ripetu, signifis la naskiĝon de esperantologio kiel esplora scienco. Tamen por ke la scienco sin sentu memstara teorio, necesis doni al ĝi apartan nomon. Kaj estas tute nature, ke post René de Saussure, la patro de esperantologio, devis veni Eugen Wüster, la baptinto.

Naskita en 1910 kaj ricevinta sian nomon en 1921, esperantologio estas unu el la plej interesaj lingvaj teorioj, kiu povas multon promesi al la ĝenerala lingvistiko. Esperanto estas unika en multaj rilatoj: ĝin uzas internacia kolektivo, kiu estas esence malsimila al la "normala" tipo de lingvaj komunumoj (etnaj aŭ naciaj); Esperanto estas portanto de internacia kulturo, dum ĉiuj aliaj lingvoj enhavas nur fragmenton de internacia kulturo; Esperanto estas tre interesa studobjekto de la vidpunkto de la teorio, kiu analizas ligojn inter lingvo kaj pensado (kiamaniere oni ricevas la kapablon pensi en la dua — negepatra — lingvo, kiel Esperanto?).

Tamen la menciitaj problemoj (planlingvo kaj socio, planlingvo kaj kulturo, planlingvo kaj pensado) ankoraŭ ne estas sufiĉe konsiderataj en la esperantologio, kiu ĝis nun limiĝas al pli proksimaj taskoj de la struktura analizo de Esperanto. Tion bone montras la novpublikigita libro de Eugen Wüster, kie estas kolektitaj liaj verkoj el la jaroj 1917-1973.

Sinteno ne klara, sed signifo granda

Wüster eksplicite montras sin daŭriganto de la laboro de René de Saussure kaj plene akceptas lian teorion pri la gramatika karaktero de la radikoj. La konvinko pri la taŭgeco de Saussure'aj principoj venas de la pri lingvaj okupoj de Wüster mem: post 1917 oni kont-

raktis kun li pri ellaboro de Esperanto-vortaro. De komence la entrepreno estis tre modesta: "Sensignifa eldonisto donis al mi kontrakton laŭ kiu mi ellaboru por li malgrandan Esperanto-vortaron", rememoras Wüster en 1973 (p. 245). Sed tiu projekto rezultiĝis en la formo de la fama *Enciklopedia vortaro*, nur duono de kiu estis publikigita en 1923-29. Tiu periodo, en kiu Wüster laboris pri la vortaro (1917-1929), estis ankaŭ la tempo de la plej gravaj esperantologiaj analizoj de Wüster.

Estas interese, ke la direkto de tiuj analizoj sekvis la vojon "de la semantiko al la formo": en la verkoj de 1917-1923 Wüster okupiĝas plejparte pri la kunmetitaj vortoj kaj ties **signifoj**; kiam en 1923 aperis la unua kajero de la *Enciklopedia vortaro*, ĝi enhavis la gravan enkondukan parton pri "Esperantologiaj principoj" (nun republikigita en la *Studoj*, p. 71), kie Wüster parolas ne nur pri la signifo de vortoj, sed ankaŭ pri ilia ekstera aspekto. Li esploras la principojn de transkribo de internaciaj vortoj Esperanten — la vojo, kiu poste kondukos lin al la okupoj pri la internacia normigo de terminoj.

Oni scias, ke meze de la tridekaj jaroj Wüster iom post iom deflankiĝis de la esperantologia agado, kaj poste (1966) skeptike pritaksis la perspektivojn de Esperanto en la mondo. Tio ne malhelpis lin eniri la redakcian komitaton de *La monda lingvo-problemo* en 1969 kaj akcepti la rektorecon de la Internacia Somera Universitato okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Vieno (1970).

Kiaj ajn estis la vidpunktoj de Wüster en la lastaj jardekoj de lia vivo, liaj esperantologiaj verkoj longe gardos sian signifon por plua evoluigo de esperantologio. Mi povas nur bedaŭri, ke la novpublikigitaj *Esperantologiaj studoj* de Wüster, tre rekomendindaj por ĉiu esperantologo kaj esperantologema esperantisto, ne estas samgrade konsulteblaj por la lingvistoj ekster la Esperanto-movado.

S. Bakrin

Kien iri? Kion fari?

Aprilo

- 03-06 1-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Juiz de Fora, Brazilo (M.P. Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, apto. 73, Santos, SP)
- 03-07 4a Tendaro de HEJS, Gandia, Hispanio (C.N. Moya Seguí, C. Angel del Alcázar, 11-13^a, Valencia 18)
- 03-07 4a Internacia Junulara Festivalo, Gorizia, Italio (IEJ, C.P. 219, I-56100 Pisa)
- 04-07 Eŭropa E-Konferenco, Bruselo, Belgio (Eŭropa E-Centro, Montoyerstr. 37b24, B-1040 Brussel)
- 04-07 64a Brita Kongreso kaj JEB-Kongreso, Edinburgh, Britio (A. Goodheir, 16 Woodland Drive, Coatbridge, ML5 1LE)
- 04-07 Laborgrupoj ĉe muelejoj, Bonnat, Francio (Les Moulins des Apprentis, F-23220 Bonnat, Creuse)
- 05-07 35a Kongreso de SAT-Amikaro, Boulogne-sur-Mer, Francio (G. Barde, 1, rue J.J. Rousseau, F-62222 St. Martin-Boulogne)
- 06-13 Renkontiĝo de infanoj en Grésillon, Francio (Esperantista Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 11-13 Jarkongresoj de DEA, DEFA kaj DLEA, Næstved, Danlando (Fyrrevaenget 4, DK-4700 Næstved)
- 13 Kongreso de Kataluna kaj Okcitana Federacio, Béziers, Francio (S-ino Authier, 9, rue G. Picot, F-34500 Béziers)
- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 19-20 Renkontiĝo de FFEA en Grésillon, Francio (Esperantista Kulturdomo, F-49150 Baugé)
- 19-20 Jarkunveno de SLEA, Huskvarna, Svedio (I. Landén, Gesällgatan 8. A., S-561 31 Huskvarna)
- 23-27 Internacia Studenta E-Konferenco, Łódź, Pollando (ISEK 80, str. Piotrkowska 77, PL-90-423 Łódź)
- 23-27 8a Studenta Interlingvistika Seminario, Pomiechówek, Pollando (Interlingvistika Scienca Rondo de SAPS, str. Krak. Przedmieście 24, PL-00-325 Warszawa)
- 25-27 SOGELO-Tago, Neustadt, FRGermanio (H. Walter, Naulottstr. 3, D-6730 Neustadt)
- 30-04/5 72a Franca Kongreso de Esperanto, Paris, Francio (UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

Majo

- 01-03 6a Unuamaja Renkontiĝo de E-Junularo, Tuzla, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/1, YU-71000 Sarajevo)
- 01-04 Jarkongreso de Svisa E-Societo, Basel, Svislando (E-Grupo, Pf. 225, CH-4003 Basel)
- 01-04 Esperantista grupvojaĝo, Istanbul, Turkio ("Suno kaj Maro", Via S. Maurillo 7, I-20123 Milano, Italio)
- 02 Limdato por la Internacia Ekzameno
- 02-04 15a Kultura Semajnfino, Blieskastel-Niederwürzbach, FRGermanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)
- 02-05 13a Tutlanda Kunloĝado, Yaizu, Japanio (E-Domo, Tōkyō-to, Sibuya-ku, Yoyogi-san-tyōme 46-17, Sone-biru-502-gō, 154)
- 03-04 Trilanda Renkontiĝo, Maastricht, Nederlando (E-Centro, Frankenstr. 149, 6224 GM Maastricht)
- 03-30 FERIAJ E-kursoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 03-30 FERIAJ E-kursoj ĉe la maro, Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, vd. supre)
- 09-11 16a Markola Kongreso, Folkestone, Britio (G. Hawker, 66 Black Bull Road, Folkestone, Kent CT19 5QU)
- 10 Simpozio pri gepatra-lingva influo en Esperanto, Urbana-Champaign, Illinois, Usono (B. Sherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, Urbana, Ill. 61801)

- 11-14 15 jaroj de E-elsendoj de Radio Sorocaba, Sorocaba, Brazilo (E-Klubo, Rua da Penha 455, C.P. 234, BR-18100 Sorocaba, SP)
- 15-18 Esperantista Renkontiĝo en Altaj Tatroj, Zakopane, Pollando (AE SSR, Sobotske Nam. 1735, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio)
- 15-25 Turisma Semajno, Velingrad, Bulgario (Esperanto, Pk. 7, BG-4600 Velingrad)
- 16-22 32a Kongreso de IFEF, America, Nederlando (W.L. v. Leeuwen, Julianaplein 2, 1097 DN Amsterdam)
- 17 Jarkunveno de Nederlanda E-Asocio, Utrecht, Nederlando (E-Centro, Riouwstr. 172, 2585 HW Den Haag)
- 17-18 Jarkongreso de SEF, Hallsberg, Svedio (B. Bengtsson, SJ-Hus 8B, V. Storg, S-69400 Hallsberg)
- 23-26 12a Trilanda E-Konferenco, Udine, Italio (M. Stuppnig, Esperanto-Str. 175, A-9601 Arnoldstein, Aŭstrio)
- 23-27 58a Germana E-Kongreso (kun junulara renkontiĝo), Berlin (Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80)
- 28-01/6 5a Internacia E-Renkontiĝo, Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 31-01/6 Esperanto-Festo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
- 31-02/6 Kongreso de Franca Katolika E-Asocio, Sens, Francio (J. Vincent, 26 bis, rue de la Milngavie, F-49150 Baugé)
- 31-07/6 Internaciaj Migradtagoj, Edlach, Aŭstrio (Monda Turismo, Stieberg. 6/22, A-1150 Wien)

Junio

- 01-08 5a Ĉebalta E-Printempo, Ustonie Morskie, Pollando (PEA, pk. 30, PL-75-950 Koszalin)
- 01-29 FERIAJ E-kursoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 01-29 FERIAJ E-kursoj ĉe la maro, Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, vd. supre)
- 08-29 Internacia E-Kurso, Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 09-14 Internacia E-studsemajno, Inari, Finnlando (Esperanto, Kompatie 5, SF-17300 Vääksy)
- 13-17 Somernokta Festo de GEJ, Lohne, FR Germanio (M. Böckmann, Mühlenstr. 8, D-2841 Steinfeld-Mühlen)
- 13-22 10a Esperantista Ŝak-Festivalo, Ĉeske Budějovice, Ĉeĥoslovakio (L. Fiala, Fügnerova 28, CS-290 01 Poděbrady)
- 14-15 Staĝo de Esperanto parolata, Soultzbach, Francio (E. Ludwig, 46, route de la Schlucht, Stosswehr, F-68140 Munster)
- 15-22 Kolokvo de TEJO (kun Eŭropa Konsilio), Strasbourg, Francio (TEJO, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam)
- 16-27 7a Internacia E-Feriado, Międzyzdroje, Pollando ("Gromada", Pl. Lotników 7, PL-70-414 Szczecin)
- 20-25/7 20-jara Jubileo, Primošten, Jugoslavio (Esperanto, YU-59202 Primošten)
- 27-29 8a Kongreso de Esperantistoj en Slovakio, Prešov, Ĉeĥoslovakio (A. Lukáč, str. Pištejiho 27, CS-080 01 Prešov)
- 29-12/7 27a Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio, (ĈEA, Jilska 10, CS-110 00 Praha)
- 29-18/7 Esperanta Laborkampado, Mezőtúr, Hungario (E-Grupo, Petőfi u. 5, H-5400 Mezőtúr)
- 30-04/7 Somero de Jyväskylä, Jyväskylä, Finnlando (T. Tyynelä, Taidepolku 6 J, SF-40720 Jyväskylä 72)

Julio

- Julio 13a Pionira Tendaro, Zánka, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- Laborbrigado de E-Junularo, Kraków, Pollando (PEJ, str. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)
- 01-15 Laborgrupoj ĉe muelejoj, Bonnat, Francio (Les Moulins des Apprentis, F-23220 Bonnat, Creuse)
- 01-21 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, F-49150)
- 01-29 E-kursoj por lernejoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

02-08 Amikeco-Kongreso, Oberkirch, FR Germanio (P. Delaire, B.P. 2002, F-45010 Orléans Cedex, Francio)
 04-11 Internacia E-Ferio, Felixstowe, Britio (Anglia Tours, 11 Northgate St., Ipswich, Suffolk IP1 3BX)
 05-06 Renkontiĝo de fervojistoj, Dunakeszi, Hungario ("J. Attila", Gyartelep, H-2120 Dunakeszi)
 06-12 18a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
 06-20 Internaciaj E-kursoj, Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
 07-25 Junulara E-Laborbrigado, Białyostok, Pollando (PEA, pk. 67, PL-15-950 Białyostok)
 11-17 Feriosemajno de naturamikaj esperantistoj, Oberkirch, FR Germanio (F.W. Poppeck, Lohmühlweg 1, D-7602 Oberkirch)
 11-17 Antaŭkongreso de SAT, Oberkirch, FR Germanio (F. W. Poppeck, vd. ĉi-supre)
 12-14 40a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, Plovdiv, Bulgario (BEA, pk. 184, B-4000 Plovdiv)
 12-15 1-a Tutamerika E-Kongreso kaj 2a Latinamerika E-Kongreso, San Luis, Argentino (Casilla Correo Central 289, RA-2000 Rosario)
 12-25 Somera E-Lernejo, Košické Hámre, Ĉeĥoslovakio (E. Erby, Dom Umenia, CS-041 23 Košice)
 12-25 Internaciaj Universitataj Semajnoj, Primošten, Jugoslavio (Eŭropa Klubo, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio)
 13-26 Somera E-Tendaro: Lančov, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha)
 14 Internacia Virina Renkontiĝo, Budapest, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
 14-20 2a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Szombathely, Hungario (E. Csiszár, Kulich Gy. u. 25, H-8100 Várpalota)
 14-23 13a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
 17-20 Biciklista E-renkontiĝo, Hamburg, FR Germanio (T. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80)
 17-27 13a Renkontiĝo de Freinet-edukistoj, Madrid, Hispanio (B.R. Ubeda, C. Zurbano 66-6°, Madrid 10)
 19-24 40a Kongreso de HEF, Madrid, Hispanio (L.K.K., C. Atocha, 98-4°, Madrid 12)
 19-25 53a Kongreso de SAT, Rijeka, Jugoslavio (53a Kongreso de SAT, Fr. Matkovića 16, YU-51000 Rijeka)
 19-27 Internacia E-studsemajno, Vääksy, Finnlando (Esperanto, Kompatie 5, SF-17300 Vääksy)
 20-01/8 Internacia Infana E-Vilaĝo, Funka, Pollando (PEA, str. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
 22-11/8 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, Grésillon, F-49150 Baugé)
 23-24 67a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, Jokohamo, Japanio (JEI, Waseda mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, 162)
 24-01/8 14a Konferenco de ILEI, Cottonera, Malto (C. Mallia, 89 Sanctuary St., Zabbar)
 25-27 Somera Kunloĝado, Tokio, Japanio (E-Domo, vd. sub majo)
 25-31 Slovaka Paradizo, Ĉeĥoslovakio (P. Pavúk, str. Konrádova 6/8, CS-052 01 Spišská Nová Ves)
 25-01/8 36a Internacia Junulara Kongreso, Rauma, Finnlando (36a IJK, Anundilankatu 3, SF-26100 Rauma 10)
 25-01/8 Kongreso de E-vegetaranoj, Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
 26 Publikigo de la Unua Libro de Esperanto, 1887
 26-29 2a Pacifika E-Kongreso, Vancouver, Kanado (2a Pacifika Kongreso de Esperanto, 373 Guilby St., Coquitlam, B.C. V3K 3Y5)

KOMPLETIGOJ DE ĈI TIU KALENDARO aperos en nia numero de julio/aŭgusto. Sendu la informojn al la redakcio antaŭ la fino de majo. Bv. atenti, ke ĉi tiun rubrikon principe ne eniras aranĝoj de lokaj karaktero kaj signifo. Pri informoj bezonataj vidu ĉi-supre.

26-01/8 Internaciaj Feriaj Kursoj, Århus, Danlando (IEA, Banegardsgade 19, DK-8000 Århus C.)
 26-02/8 31a Kongreso de KELI, Södertälje, Svedio (B. Gunnarson, P.O.B. 44, S-640 26 Julita)
 27-01/8 Antaŭkongreso de la 65a UK, Gdańsk, Pollando (PEA, str. Legnicka 2/1, PL-80-200 Gdańsk)
 27-09/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha)
 28-02/8 Antaŭkongreso de la 65a UK, Mölle, Svedio (LKK de 65a UK, Box 4009, S-122 04 Stockholm-Enskede)
 30-02/8 Somera Renkontiĝo, Falköping, Svedio (Esperanto-klubb, Box 64, S-521 01 Falköping)

Aŭgusto

01-29 Feriaj E-kursoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
 02-09 65a Universala Kongreso de Esperanto, Stockholm, Svedio
 02-09 18a Internacia Infana Kongreseto, Stockholm, Svedio (UEA, Rotterdam)
 03-14 ICEM-Esperanto, La Turmelière, Francio (P. Poisson, 239 Rue Victor Hugo, St. Cyr sur Loire, F-37100 Tours)
 09-15 Intensaj E-kursoj, Barlaston, Britio (The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG)
 09-16 48a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Bosön, Svedio (LKK de 65a UK, vd. supre)
 09-23 Somera E-Lernejo, Eger, Hungario (HEA, Pf. 105, H-3301 Eger)



Ĝojoj de internaciaj renkontiĝoj: Tibor Sekelj kaj Yukiko Isebe revidiĝis en Lucerno pasintjare. Foto: Z. Nikolov

10-12 Postkongreso de la 65a UK, Oslo, Norvegio (NEL, Boks 942, Oslo 1)
 10-16 Postkongresoj de la 65a UK en Tännadalen, Dalekarlio kaj Gotland, Svedio (LKK de 65a UK, vd. supre)
 10-17 Internacia Feriosemajno, Krommenie, Nederlando ("Unueco", Gagarinstr. 104, 1562 TD Krommenie)
 11-13 Nordlandaj Kulturtagoj, Kungälv, Svedio (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy, Finnlando)
 12-21 Seminario pri orienta medicino, Lublin, Pollando (Studenta Orientalisma E-Rondo, ZW SZSP, 1 Armii WP 5, PL-20-078 Lublin)
 12-26 Somera E-Lernejo, Władysławowo, Pollando (PEA, str. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
 12-01/9 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo, Grésillon, F-49150 Baugé)
 23-30 Familia Tendaro, Thomsdorf, GDR (W. Pfennig, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg)
 29-31 Seminario pri Esperanto en la scienco kaj tekniko, Ústí nad Labem, Ĉeĥoslovakio (J. Patera, Na usedlosti 1534 CS-140 00 Praha 4-Krč)

Provo provoki diskuton

Recenzas Constantin Dominte (Rumanio):

Pri lingvo kaj aliaj artoj, de William Auld (1924-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 213p. 21 cm. Movado 7. ISBN 90 6336 006 1.

Auld kunigis sub ĉi tiun titolon 15 eseojn, antaŭe aperintajn en diversaj movadaj revuoj. Kial pri lingvo kaj aliaj **artoj**? Pro almenaŭ du kialoj: Unue, por la lingvo, pri kiu la eseoj temas, grave rolis la konscia faktoro, samkiel en iu artaĵo. Due, laŭ la aŭtoro, la estetika funkciado de la lingvaĵo (poezia funkciado, laŭ Roman Jakobson) troviĝas inter la plej gravaj lingvoroloj. La beletra "manipulado" de lingvo estas unu el la tradiciaj artoj — la vortarto.

Lerte, sed ne senargumente, la aŭtoro refutas iujn antaŭjuĝojn pri la Internacia Lingvo ("Mitoj kaj faktoj pri Esperanto"), turnante kelkfoje la kontraŭargumentojn favore al la kritikita objekto ("Pensoj pri la 'juneco' de la esperanta literaturo"). Li rimarkas, tamen, signojn pri evoluo kaj maturiĝo, almenaŭ de la poezio, kaj bildigas tion per citaĵoj el la verkoj de Miĥalski kaj Kalocsay, kiuj muldis en la lingvo ritmojn kaj esprimeblecojn nesupozitajn ("La evoluo de la esperanta poezio"). Aparte interesa estas la eseo "La internacia lingvo kiel belarta tradukilo". Auld atentigas tie, ke ne ĉio valoras el la kultura vidpunkto estas verkita nur en la lingvoj plej vaste parolataj (p. 99). Preskaŭ substrekante la aserton de la aŭtoro, ke grava kondiĉo de "ebleco" aŭ "neebleco" de la traduko estas la talento de la tradukisto (p. 106), oni ne povas konsenti ankaŭ pri la aserto, ke lingvo en si mem, signifas tiurilate nenion (p. 107). Ni pensu nur pri la malgranda ekzemplo de la dustrofa poeziaĵo de Heine, *Ein Fichtenbaum steht einsam*, bela peco de pejzaĝa kaj samtempe **erotika** liriko, ĉar la norda **pino**, revanta je la suda **palmo**, estas en la germana **virgenra** substantivo, dum la objekto de ĝia revo estas **ingenra**. En Esperanton ĝin tradukis Zamenhof mem (*Fundamenta Krestomatio*, 15a eldono, p. 326), sed la rezulto estis nur pripejzaĝa lirikaĵo; la erotika sugesto perdiĝis pro la neŭtra genreco de la du substantivoj. Estas en ĉi tiu punkto iu **baro**, kiun simple **la lingvo** metas antaŭ la tradukon.

La eseo "Pasivo-Pasio", pri la poeto Eŭgeno Miĥalski, malkaŝas iujn valorojn de lia poezia verkado, sed finiĝas per la prava ideo, ke la troa tezismo mortigas la arton, kio okazis dum la lasta kreoperiodo de tiu aŭtoro. "Konversacia lingvaĵo en nia literaturo", surbaze de specimenoj el la verkoj de R. Rossetti, F. Szilágyi, G. Baghy kaj C. Rossetti, montras la eblecon de stila diverseco en Esperanto.

Oni permesu al mi kelke da rimarkoj pri la mallonga eseo "Ĉu prefere nacilingvo?". Konsiderante kiel pravan la emfazon de la protektado de la naciaj lingvoj per eventuala internaciskala uzado de Esperanto, estas tamen tute kritikinda la sinteno, kiu — resume — reduktas la rolon de la naciaj lingvoj al informo pri vojo aŭ peto pri manĝo dum eksterlanda vojaĝo. Estas dezirinde kaj necese, ke Esperanto akiru pli vastan uzeblecon. Tamen, por ĝisfunda kono de la vivo kaj kulturo de popolo, alia vojo ankoraŭ ne estas ekster la bonega rego de ties lingvo. La grava utilo de Esperanto estas nepre agnoskinda koncerne la multflankan internacian komunikadon, sed ne ĉiuj teranoj estas interesitaj pri la internacia komunikado, i.a. pro siaj profesioj — tre specifaj, nur loke bone praktikeblaj. Tio fakte ne gravos iam por Esperanto, ĉar pravigos ĝian vivon kaj utilecon ne, unue, astronomia nombro da parolantoj, sed la diseco de tiaj parolantoj ĉirkaŭ la terglobo.

Entute, la libro estas interesa kaj ĝia pleja graveco konsistas en la diskutigo de ideoj, kiun ĝi povus provoki. Se la aŭtoro pretus rekonsideri kelkajn asertojn, la esearo indus tradukiĝi en naciajn lingvojn vaste uzatajn, por plia diskonigo de Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

Patosa grekeco

Recenzas Mauro Nervi (Italio):

Danai Vraila; Romano, de Despina Patrinu. El la greka trad. la aŭtoro. Ateno: La aŭtoro, 1979 (ne indikita). 129p. Ilus. 22 cm.

Legante ĉi tiun romanon de Despina Patrinu (jam konata kiel aŭtorino de la novelaro *Homa animo*) oni havas la impreson, ke fragmento de la pragreka tragedia mondkoncepto pluvivas en la sentivo de la moderna Greklando; kaj la aŭtorino, kiu evidente ensorbis la kulturon kaj la tradicion de sia popolo, ĉi-verke esprimas tian sentivon tra la filtrilo de sia propra personeco. Ĝuste la **grekeco** de *Danai Vraila* estas la kvalito, kiu plej tuŝas la ordinaran leganton tra la 129 paĝoj de la romano.

Tia karakterizo manifestiĝas ĉefe en la unua parto de la libro, kaj kulminas en aparte sukcesaj momentoj per tute helena kunigo de tragiko kaj sereno: la leganto ne forgesos la kriojn de la servistino sur la plaĝo, ĉe serena sunsubiro; la citronarbojn de avo Taso; aŭ la vigliĝon de la vilaĝa marbordo, kiun Despina Patrinu priskribas per atentokapta, multkolora heleneco.

Tia estas la kadro, kaj, miatakse, ankaŭ la vera esenco de la libro. Sur tia fono disvolviĝas la historio de Danai, knabino en familio, kiu ne komprenas ŝin, kaj

de ŝia kuzino Anna, la sola, kiu kondukas amike al la protagonistino. Ili ambaŭ volas fuĝi for de la opresa familia medio: ĝuste la nokton de ŝia foriro tamen, la patrino de Anna sin mortigas ĉeeste de sia filino, kiu dronas en senrimedan nervkrizon; Danai edziniĝas eskapcele, sed tie baldaŭ komprenas, ke ŝi ne povas toleri sian edzon, kaj revenas hejmen. Tuj poste, ankaŭ Anna mortas, kaj Danai sentas tion kiel la pereon de siaj propraj esperoj; kaj, fremdiĝinte al ĉio, kio ĉirkaŭas ŝin, Danai definitive foriras.

Tiun ĉi framon la aŭtorino subtenas per insista, preskaŭ neŭroza introspekta psikologio. Diras Danai (p. 103): "La revo estas la vivo de mia animo, ĝia vigla vibranta koro, la realaĵo de la nekonata mi mem". Tia estas, eble, ankaŭ la filozofio de Despina Patrinu: la revo kontraŭ la realo, kio ofte signifas: la individuo kontraŭ la socio, la patoso kontraŭ la lucido. Legontoj prijuĝos mem la valoron de tiu filozofio, kaj ĉu mi bone interpretis ĝin. Ja konstatablas tamen, ke surbaze de siaj principoj la protagonistino de la romano kondukas laŭ kliŝoj, kiuj ne plu kongruas kun la aktualaj etiko kaj pensmaniero, kaj certe ĉiuj iom modernaj virinoj konsentos kun mi, ke la priskribaj paĝoj de la romano estas preferindaj al la multaj, en kiuj la patosaj ondadoj de Danai riskas sufoki la bonintencan leganton.

Tipografie, la libro modestas, kaj multspecaj eraroj — presaj, stilaj, gramatikaj — bedaŭrinde mispicas preskaŭ ĉiun paĝon.

Mendu ĉe UEA: 16,20 (por Nederlando 16,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Altkvalita traduklaboro

Recenzas Vladimir V. Samodaj (Soveta Unio):

Elektitaj fabloj, de I.A. Krilov. El la rusa trad. S.G. Rublov. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 15. ISBN 90 6336 009 6.

Ivan Andrejeviĉ Krilov (1769-1844), unu el la plej elstaraj rusaj verkistoj, publicisto kaj verkinto de komedioj, kreadis siajn fablojn antaŭ 190-140 jaroj, sed eĉ nun apenaŭ eblas trovi ruslingvanon, al kiu ne estus konataj liaj fabloj. Unu fonto informas, ke fabloj de Krilov estas tradukitaj al pli ol 50 lingvoj. Tiu pravas, ke la apero de la Krilov-fablaro en Esperanto ne estas hazarda.

Parte, Krilov verse rerakontis fablojn de siaj famaj antaŭuloj Ezopo, Fedro, Lafonteno; tamen, ĉefparte ili estas plene originalaj. En siaj verkoj la aŭtoro primokas ne nur la maldecajn kaj malnoblajn ecojn de unuopaj homoj, socigrupoj kaj tavoloj, sed li ankaŭ — en vualita formo — kritikas konkretajn agojn de gravaj ŝtataj personoj tiutempaj, pritraktas historiajn eventojn. Ofte li prenas la besto-rolantojn el la rusaj popolaj fabeloj. Multaj frazoj de Krilov estas nun vaste uzataj kiel proverboj.

DESPINA PATRINU

DANAI
VRAILA



ateno

Krilov



elektitaj

FABLOJ

La tradukinto sukcesis majstre transdoni la ruslingvan originalon, kiu en la nova formo sonas same flue, nature kaj sencoplene. Jen estas kelkaj ekzemploj:

*En raso kaj en rang' ne gravas alta grad',
Se krudas la anim' en primitiva stat'.*

*

*Afablo kaj komplez' facilas por babilo,
Amikon veran montras malfacilo.*

*

*Multfoje oni diras kun logiko
Pri malutil' de flat', kaj tamen sen sukces',
Ĉar flato al la kor' penetras per kares'.*

La libro enhavas enkondukon de d-ro H. Tonkin, antaŭparolon pri Krilov kaj "rimarkojn" de la tradukinto "Pri la Esperanta traduko de krilovaj fabloj", kie Rublov eksplikas, interalie, la sonritman strukturon, larĝe aplikitan en la traduklaboro. Tio signifas, ke " ... parencaj kaj identaj sonoj (konsonantoj) troviĝas ne nur en rimoj, sed ankaŭ **interne** de verslinioj; ili harmonie kunligas la tekston **je unu poezia tuteco** ... Parencaj kaj identaj sonoj povas ripetiĝi aparte aŭ en formo de kombinaĵoj (en **rekta** kaj **inversa** ordo)". Ekzemple:

Tre lerta estis frap', kranio plene krevis.

Vere laŭdinda estas tiu ĉi eldonprodukto de TK/Stafeto. La libro estas belaspekta, bone presita kaj preseraroj preskaŭ mankas. Bedaŭrinde, en la libro ne estas konservita la ordo de la manuskripto, sed la fabloj estas lokitaj alfabete laŭ la titoloj. Krome, ne estas aplikita la "simetria dislokiĝo de verslinioj (rilate al margenoj)", malgraŭ ke tiun principon mencias Rublov en siaj "rimarkoj".

Apartan prezenton meritas la tradukinto. Mortinte julie 1979 (vidu nekrologon en *Esperanto* 11/79, p. 196), Rublov postlasis manuskripte plurajn centojn da tradukitaj poemverkoj, grandaj kaj malgrandaj, de la plej elstaraj rusaj poetoj el la pasinto kaj nuntempo, inter kiuj kolosas Puŝkin, Lermontov, Nekrasov, Majakovskij. Meritas atenton ankaŭ la "Struktura vortaro de Esperanto", "Poeziaj rimedoj de Esperanto" kaj liaj multaj aliaj laboroj. Rublov konstante kontroladis kaj poluradis siajn tradukojn. Li ne trumpetis pri sia

laboro, sed abel-simile produktadis. Lia laboro meritas la sekvan citaĵon el la recenzata libro:

*Reklamas sin vantulo sen modero,
Sed tre modestas li en la afero.
La granda hom' modestas en parol'
Kaj grandas en aferoj por popol'.
Laboras li persiste, en trankvilo
Kaj sen babilo.*

Mendu ĉe UEA: 21,00 (por Nederlando 21,84) gld., plus sendokostoj 10%.

Ĝi sonas tre plaĉe

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Danĝera ul', de Ĵak Lepŭil'. El la franca trad. Georgo Lagrang'. Pizo: La Nuova Frontiera, 1978. Kaseto stereofona, 50-minuta, kaj libro 71p., ilus. 21 cm.

Pasis dek du jaroj post "Jen nia mondo", unua disko kiu havebligis — kvankam muzikaranĝe ne ĉiam taŭge — iujn protestajn kantojn internacilingve. La establularo iuloke ŝanĝiĝis, sed ne ĝia konduto. La kaseto estas do, laŭ enhavo, bezonata kaj inda anstataŭanto de tiu neaĉetebla disko. Ĵak kaj Armel' Lepŭil' kantas kelkajn kantojn tiamajn, kiel "Sinjoro Prezident'" de Boris Vian' kaj "Kion vi lernis en lernejo?" de Tom Pakston. Sed ĉefas pli novaj francaj protestkanzonoj de Maksim' Leforestje' kaj Fransŭa' Beranĝe', el kiuj almenaŭ la lasta estas nesufiĉe konata en iuj tro-anglemaj landoj.

La bone kanteblaj tradukoj donas ĝustan impreson pri la originaloj kaj kompreno ne postulas orel-cerbajn akrobataĵojn. La klarigoj de la tradukinto en la tekstlibreto bone prezentas tradukproblemojn sed estas plejparte nenecese pardonpetaj. Senbezona estas tamen la revivigo de "'stas'", kaj franceca virigo de akcento dum la muziko postulas inan frazfinon.

Kantado kaj akompano plejofte sonas tre plaĉe. Foje la trobadorado lulus nin, se enhavo kaj sonkvalito ne tenus nin viglaj. La klare franca prononco aldonas aŭtentikecon al almenaŭ la origine francaj tekstoj. Ĵak

Lepŭil' havas agrablan voĉon kaj la muziko estas al-tira elemento de la bendo.

La registrita signalo plurloke estas tromodulita. Simplaj magnetofonoj reagis al tio per neĝuebla sonreprodukto. Krome, ĉe ne-stereofona aŭdigo, kelkloke la voĉo dronas en la muziko. Tre bedaŭrinde, ĉar la plenumo indus pli bonan teknikon.

Ĉiuj tekstoj aperas en tekstlibreto, kiu ankaŭ kiel presaĵo estas havinda. La nomojn oni skribas Esperante (kiel ĉi-supre). Mi ne kontraŭas tion: tiel ni almenaŭ povas prononci. Sed oni ne skribu foje Olrajt, foje Allrajt, foje Vian', foje Vjan. Listo kun nacia ortografio estus bezonata, ĉu por mendi diskojn de la originalaj kantistoj-aŭtoroj, ĉu por deklaro ĉe kopi-rajtaj instancoj kiam iu volas mem prezenti publike iun el la kantoj — kaj estas dezirinde ke iuj volu! Ĉe la kaseto eĉ ĉiaj aŭtor-informoj mankas.

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Post vivolonga sperto


Recenzas Rikardo Ŝulco (FR Germanio):

Esperanto laŭ la patrina metodo / Esperanto nach der Muttermethode, de August Weide (1904 -). Hamburg: La aŭtoro, 1979. 319p. 21cm.

August Weide instruis Esperanton entute dum kvardek jaroj: ekde 1934 en por li fremdlingvaj landoj, ekde 1947 en la ŝtata lernejo por fremdaj lingvoj en Hamburgo. La lernolibro, kiun li nun eldonis, resumas liajn vivolongajn spertojn kiel Esperanto-instruisto — praktikisto. La kursa, do la precipa parto de la libro entenas 264 paragrafojn. Ĉiuj konsistas el multo da demandoj de la instruisto kaj modelaj respondoj de la lernanto. Tiu konversacia metodo, per siaj simplaj, ripetoriĉaj frazoj, celas duonkleran lernantaron, do ĝuste tiun kiu frekventas la kursojn de vesperlernejoj. Per ĝi la instruisto provokas seneraran babiladon eĉ ĉe personoj, kiuj antaŭe neniam esprimis sin en fremda lingvo. Ili lernas uzi Esperanton por ĉiuj bezonoj de la praktika ĉiutaga vivo. Ili vere lernas paroli, ne nur kompreni ĝin.

Kursoj laŭ tiu metodo, se lerte gvidataj, ne malpleniĝas iom post iom, sed kontraŭe, je la fino, sekve de la varbado de la kursanoj mem, ili nombras pli da lernantoj ol en la komenco. La tuta libro estas dulingva (Esperanto kaj la germana lingvo). Ĝi povas esti uzata ankaŭ de esperantistoj, kiuj volas lerni la germanan. Tie kaj jene inter la demandoj troviĝas taskoj por legado kaj tradukado, kio permesas kontrolon (eventuale ankaŭ memkontrolon) de la dume farita progreso. Malgrandaj vortlistoj (ambaŭdirektaj), la 16 fundamentaj reguloj kaj la korelativa tabelo kompletigas ĉi tiun libron.

La plej valoraj partoj de ĉi tiu verko tamen estas — laŭ mia opinio — la koncizaj antaŭrimarkoj de la verkinto.




Ili atestas pri profunda kono de la lernopsikologio. La artikoleto "Kiel paroligi bebojn en Esperanto?" estas leginda de ĉiuj gepatroj kun etuloj.

Mendu ĉe UEA: 55,20 (por Nederlando 57,41) gld., plus sendokostoj 10%.

(Fa)bela mondo

Recenzas Cobi Pothuizen (Nederlando):

Hungaraj fabeloj, de Elek Benedek (1859-1929). El la hungara tradukis Mária Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 70p. Ilustris Ida Csáky. 20 cm. ISBN 96 3571 061 5.



Tiuj ĉi dek fabeloj, kiujn elektis la tradukinto kaj zorge ornamis la ilustrinto, estas ĉerpaĵo el la kvinvoluma verko de Benedek, *Hungaraj fabeloj kaj legendoj*. Tie aperis, prilaborite, la pli frue

publikigitaj folklorajoj, kaj aldone ankaŭ tiuj, kiujn Benedek mem kolektis. En Hungario Benedek estas konata kiel unu el la fondintoj de la porinfana literaturo. La tradukintino atentigas, ke tiu ĉi "modesta specimeno el liaj verkoj celas esti duobla omaĝo: omaĝo al la memoro de la unua hungara verkisto, kiu plene dediĉis sin al la plej junaj legantoj, kaj al la Internacia Jaro de la Infano, kiu donas la plej indan okazon por konatigi al la esperantistaro la miraklan mondon de hungaraj fabeloj." Tiu mirakla mondo fakte ne devus rezerviĝi ekskluzive por infanoj. Ĝi estas priskribita en la konata (fa)bela lingvo, kun: "ĉu estis, ĉu ne estis...", "trans la fabeloceano iam vivis..." ktp. Rolas pluraj konataj fabelaj herooj, sed ankaŭ kelkaj tute ekzotikaj, kiel ekz. "reĝidino de Sunsubirlando".

Enŝteliĝis kelkaj eraroj, ĉefe presaj, sed ĝenerale pravas la tradukistino, kiam ŝi parolas pri la "mirinda mondo de hungaraj fabeloj".

Mendu ĉe UEA: 10,20 (por Nederlando 10,61) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste reaperis...

Okazas foje, ke la Libroservo de UEA subite akiras kvantojn de jam delonge elĉerpitaj eldonaĵoj. Vi rimarkis en kelkaj pasintaj numeroj, ke ni komencas informi pri tio. Jen la ĉi-monataj reaperintaĵoj: **LETEROJ DE ZAMENHOF**, volumoj 1 kaj 2 (po 21,00 gld.), **KOLOROJ** de Baghy (4,50), disko **LITOVAJ POPOLAJ KANTOJ KAJ DANCOJ** (12,00). Rapidu, do!

Laste aperis...

Aperoj de Ahasvero, La, Han Riner (ps. de Henri Ner, 1861-1938). El la franca trad. Valo. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1980. 174p. Mimeo. 21cm. Dialogoj inter la "senmorta vaganta judo" de kristana legendo kaj diversaj filozofoj, politikistoj k.a. tra la historio. Prezo: 9,00 gld.

Aŝma. El la sania pere de la hana (ĉina) trad. (1964) Laŭlum. Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1980 (2a eld.). 2+79p. Kolorilus. de Huang Yongyu. 19cm. 10-Es-253S. Bindita. Eposo de nacia malplimulto en Ĉinio, pri junulino kiu fuĝas por eviti kontraŭvolan edziniĝon. Prezo: 3,30 gld.

Bibliografio de la publikaĵoj (1962-1979), Reinhard Haupenthal (1945-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1980 (2a eld., ĝisdatigita). 34p. 20cm. Verkoj, tradukoj ktp. de la aŭtoro. Prezo: 7,50 gld.

Ĉion faru memni ĉiuj, Yang Yi. El la ĉina. Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 11p. Kolorilus. de He Yanrong. 21cm. 88-Es-161P. Knabino prizorgas diversajn domtaskojn anstataŭ lasi ilin al la patrino. Prezo: 0,90 gld.

D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde (1885), Robert Louis Stevenson (1850-1894). El la angla trad. Albert Goodheir (1912-). Coatbridge: Kardo, 1980. 70p. Ilus. de Gillian Goodheir. 21cm. Fantazia romaneto pri perdroga apartigo de la morala kaj malmorala flankoj de unu homo. Prezo: 15,90 gld.

Du intervjuoj; Interparoloj kun Kálmán Kalocsay kaj William Auld, Reinhard Haupenthal (1945-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979. 28p. Ilus. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Esperanto: eine linguistische Standortbestimmung, Claude Piron (1931-). El Esperanto trad. Günther Becker (1930-). Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 1980. 34p. 20cm. Traduko de la Esperanto-dokumento *Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Prezo: 5,10 gld.

Esperanto laŭ la patrina metodo, August Weide (1904-). Hamburg: La aŭtoro, 1979. 319p. 21cm. Ampleksa frazaro por lernigi la Internacian Lingvon samtempe kun la nacia al junaj infanoj. Kun tradukoj en la germana. Prezo: 55,20 gld.

Esperanto prin proverbe, 11 x 11, Aurel Boia (1913-). București: Academia de Studii Economice, 1979. 32p. 21cm. Rapida kurso por kleraj lernantoj. Prezo: 3,00 gld.

Historio de Esperanto-movado en Oosaka, La, vol. 3, Sigeo Matumoto. Kasiwara Esperanta Dokumento-Centro, 1979. 122p. Ilus. 25cm. Japanlingva. Prezo: 8,40 gld.

Kiel diri...?; Praktika Esperanta frazeologio, L. Lentaigne. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1980. 170p. (nenumeritaj). Mimeo. 21cm. Kvin mil vortoj kaj esprimoj, laŭteme aranĝitaj. Utila suplemento al la *Proverbaro*. Prezo: 9,00 gld.

Nova vesto de la pupo, Chen Huilian kaj Tang Lufeng. El la ĉina. Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 15p. Kolorilus. de Mao Yongkun kaj Yu Li. 21cm. 88-Es-159P. Prezo: 0,90 gld.

Projekto de sennacia ŝtato kaj senŝtata nacio (forigo de milito), Jozef Hartl. Viin (Vieno): La aŭtoro, 1979. 47p. 20cm. Internacia diskutejo 7. Prezo: 9,30 gld.

Riporto skribita en la pendumila maŝo (1945), Julius Fučík (1903-1943). El la ĉeĥa trad. Rudolf Hromada (1890-1966) k.a. Prago: Panorama, 1979. 110p. Ilus. 19cm. Rememoroj el nazia karcero de kontraŭfaŝisma ĵurnalistino. Prezo: 11,70 gld.

Sportistetoj. El la ĉina. Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 21p. Kolorilus. de He Yanrong. 21cm. Bildoj de diversaj sportaj agadoj de infanoj. Prezo: 1,20 gld.

Tri noveloj, Stjepan Krčmar (1920-). El la kroatserba trad. Josip Velebit. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1980. 69p. 20cm. Prezo: 5,10 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

„Ni devas vendi!”

Unu el la plej aktivaj lokaj junularaj grupoj en la Movado estas Esperanto-Junularo Zuriĥo (EJZ) en Svislando. Surprizas ĝia noveco. De kie venis ĉi tiu vigla ĉelo en lando sen forta junulara movado? Didi Weidmann, ĝia neortodoksa sekretario, se ne la grupo mem, klarigas:

”EJZ fondiĝis en 1978. Intertempe pasis pli ol jaro, kaj ni konstatis sufiĉe grandan sukceson. Nia membraro nombras nun 36. En januaro komenciĝis denove en Zuriĥo kursoj por komencantoj kun entute 60 partoprenantoj, kaj daŭriga kurso kun 12 anoj. Kiel do ni akiris tian prosperon?

Nu, la unua paŝo estis ekhavi kernan grupeton. Tion mi akiris, instruante Esperanton al kelkaj geamikoj. En novembro 1978 ni trio pe fondis la grupon, kaj fariĝis respektive sekretario, vic-sekretario kaj kasisto! Tiam ni faris la unuan kurson. Por ĝi ni tute ne varbis publike sed nur inter niaj geamikoj. Ĝin fine partoprenis ses knabinoj; kvin el ili ankoraŭ membras en la grupo. La sekvanta paŝo estis la eldono de gazeto, ĉefe naciolingva. Tiun gazeton ni ekvendis strate. Iom post iom ni gajnis sufiĉe da interesitoj por fari la duan kaj trian kursojn. Ni komencis serĉi kontaktojn kun aliaj junu-

laraj organizaĵoj kaj aniĝis en tegmenta unuiĝo de la urbaj junularaj grupoj.

Tiel konstruite sufiĉan bazon, ni riskis pli grandajn entreprenojn. Nia plej nova okupo estas koresponda kurso, por kiu ni produktis eĉ propran lernolibron. Por ne perdi la membrojn, grave estas trovi por ĉiu okupon en la grupo. Tiucele ni kunvenas kiel eble plej ofte, ĉiusemajne. Interalie ni produktis varbofilmon por Esperanto, kaj planas baldaŭ pretigi novan. Tio estos surrealisma filmo, kiu protestos kontraŭ la detruo de nia ĉirkaŭaĵo.

Ni intencas eldoni ankaŭ libretojn, ekz. dudirektan vortaron por la germana, kaj korespondan kurson por progresintoj. Sed gravas eldoni ankaŭ aferojn vendeb-lajn ekster la Movado, ekz. nian gazeton. Mi opinias, ke nur tiel oni povas garantii sukceson, ĉar en la Movado mankas taŭga merkato, kaj per gazeto ekskluzive en Esperanto neniu novulo estas varbebla. La eldonado nur de flugfolioj ne estas sukcesa. Oni povas doni ilin al ĉiuj homoj, sed plejofte oni simple forĵetas tion. Gazeto, kiun oni povas vendi, estas pli saĝa, ĉar tiel oni reenspezas la kostojn. Nur tial, ke ni vendas nian gazeton, EJZ kapablas finance ekzisti.”

Esperanto-Jugend, la ”aĉetinda gazeto” de Esperanto-Junularo Zuriĥo estas abonebla ĉe: Didi Weidmann, Malzstr. 16, CH-8045 Zürich, Svislando. Abono: 6,00 sv.fr., plus sendokostoj: 2,80 aŭ 5,60 (aere, ekster-eŭrope) sv.fr. Poŝtekonto: 80-320 Zürich.

La tria JERB

IEL OKAZIS, ke ni pasintjare ne sukcesis raporti pri la 2a Junulara Esperantista Renkontiĝo de Brazilo (JERB), kaj ni nun rapidas skribi pri la 3a JERB. Ĝi okazis inter la 23a kaj 27a de januaro 1980, en Sorocaba (San-Paŭlo), urbo kiun la Movado konas pro la Esperantaj radio-elsendoj tie. Dum al la 2a JERB venis gejunuloj el 9 brazilaj urboj, la 3a JERB sukcesis arigi junajn homojn el 16 lokoj de Brazilo kaj gastojn el Argentino kaj Urugvajo. Al la malferma solenaĵo venis ĉ. 150 partoprenantoj. Ĉeestis (kaj parolis) ankaŭ la urbestro Gilberto Silva Velho, al kiu oni transdonis honordiplomon pro lia daŭra apogo al la Movado. Inter la gastoj troviĝis ankaŭ du episkopoj. La urba poŝtoŭicejo omaĝis la 3an JERB per speciala poŝta stampo, kio logis multajn filatelistojn kaj vekis la atenton de la publiko. Pluraj lokaj kaj regionaj gazetoj amplekse raportis pri la aranĝo. Aperis i.a. intervjuo kun prof. Sylla Chaves, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo. Li estis intervjuita tre amplekse ankaŭ en la loka radio kaj li en la 3a JERB prezentis la ĉefprelegon ”Lingvodiskriminacio kaj minoritataj lingvoj”. D-ro Walter Francini faris specialan Esperanto-kurson dum la renkontiĝo; al alia grupo instruis Fabricio R. Valle. Okazis ankaŭ artaj aranĝoj, filmprezento, ekskurso, Esperanta diservo ktp.

Laŭ raporto de
Manoel Blaz Garcia

Agresa laborstilo en Zuriĥo: Didi Weidmann kolportas sian Esperanto-gazeton tra la stratoj.

Foto: J. Oșap



Evolulandoj

- Multaj miloj da studentoj el la evolulandoj pasigas plurajn jarojn en la mondompartoj kie la Esperanto-movado estas forta. Tio devus esti granda ŝanco por informi pri Esperanto kaj rekte influigi ĝian disvastiĝon en la Tria Mondo. Ŝajnas, tamen, ke nur Hungara Esperanto-Asocio atentigas tiun eblecon. Jam fariĝis tradicio organizi Esperanto-kursojn por la evolulandaj studentoj en Budapeŝto. Unu el tiaj kursoj, por 20 diverslandaj studentoj, komenciĝis fine de 1979. La kursanoj bonvenigus viajn superflujajn legaĵojn al la adreso de s-ro Haile Negash, Laufenauer 7, H-1113 Budapeŝto, Hungario.

Irano

- La aperigo de pri-Esperantaj ĉapitroj en du gimnaziaj lernolibroj (vidu *Esperanto*, 1979 dec., p. 203) kaŭzis amasan entuziasmiĝon inter iranaj gelernantoj. Klaso post klaso, atinginte la koncernajn ĉapitrojn, spontane postulas lecionojn de Esperanto. Nur en la ĉefurbo okazas pli ol 30 kursoj samtempe. En iuj lernejoj la gejunuloj bojkotis la kursojn de la angla lingvo kaj slogane kriadis kontraŭ ĝiaj instruistoj: "Iru lerni Esperanton kaj revenu instrui ĝin al ni!"

Svislando

- En unu el la programoj de la svisa televido, la 24an de februaro, intervjuiĝis Dante Bertolini, kies itallingva antologio de la Esperanta poezio (*Dal nuovo giardino*) aperis pasintjare en Lokarno. Fine de la intervjuo, kiu traktis ankaŭ aliajn temojn, estiĝis interesa diskuto pri Esperanto kiel literatura lingvo. La elsendo okazis en tre konvena elsendohoro.

Bulgario

- Bulgara Esperantista Asocio organizas siajn kongresojn nur ĉiun kvaran jaron. Inter la 12a kaj 14a de julio 1980 en Plovdiv okazos la 40a Jubilea Kongreso de BEA. Regas grandega intereso pri ĝi, kaj antaŭ la fino de januaro jam registriĝis 1 431 partoprenantoj, inter kiuj ankaŭ 43 eksterlandanoj el 8 landoj. Adreso: La 40a Jubilea Kongreso, P.k. 184, BG-4000 Plovdiv, Bulgario.

Peruo

- Komence de februaro okazis 5-minuta televida elsendo pri Esperanto. Partoprenis Janet Skotte, ĉefa movada aktivulino en Peruo, kaj gastoj el Brazilo kaj Danlando. Tuj poste, centoj da personoj aliĝis al novaj Esperanto-kursoj.

Soveta Unio

- Dum la lastaj monatoj, okazis fondaj konferencoj de la filioj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en la Leningrada regiono (prezidanto: B. Stefanov), Ukrainio (prezidantino: E. Majburova), Litovio (prezidanto: A. Skupas) kaj Armenio (prezidanto: akademiano G. Sevak). Aperis la unua numero de la 16-paĝa informbla bulteno de la Asocio.
- Ukraina junulara gazeto *Molodj Ukraini* (eldonkvanto ĉ. unu miliono da ekzempleroj) komencis publikigi Esperanto-lecionojn de Boris Kolker (traduko kaj adapto de Vladimir Ĉarin). Pli ol 1 700 personoj sendis al la redakcio kontrolajn taskojn. La lecionoj aperos dufoje monate.

Kamerunio

- D-ro R. Corsetti, UEA-komisiito pri la Esperanto-movado en la evolulandoj, jam de pluraj jaroj havas lertan kontakton kun esperantisto en la afrika lando Kamerunio. Temas pri la sola UEA-membro tie, s-ro Jean-Marie Mboge Mbele. Lastatempe Corsetti ricevis el Kamerunio kopion de franclingva Statuto de Esperanto-Asocio de Kamerunio. Efektive, ni ne havas pliajn informojn pri ĉi tiu temo. Ĉu temas pri organizaĵo jam fondita aŭ nur pri preta statuto, kiun devos akcepti fondota asocio? Ĉu en Kamerunio vere troviĝas aliaj esperantistoj krom s-ro J.M. Mboge Mbele (B.P. 1816, Douala)?



- Kubo: La ĉi-supraj fotoj iusence ilustras aldone la ĉefartikolon de ĉi tiu revunumero. Ni ricevis la fotojn de nia peranto en Kubo, Pedro Pablo Lamas Díaz (staranta sur la dekstra foto), kiu bilde informis nin pri la fondkunveno de Avila Esperanto-Rondo en la urbo Ciego de Avila. S-ro Lamas Díaz sendis jam antaŭe al la Biblioteko Hodler ĉe UEA plurajn gazeteltondaĵojn, kiuj, same kiel kelkaj informoj pri radioprogramoj pri Esperanto, montras, ke la grandan renesancon de la Esperanto-movado en Kubo akompanas vasta atento de la nacilingva gazetaro kaj aliaj amaskomunikaj informiloj.

Informado

- *RTT*, tunizia radio-televida revuo, aperigis ampleksan ilustritan artikolon pri Esperanto, en novembro pasintjare. La teksto ĉefe rilatas al la partopreno de s-ro Abderrahman Grine, 29-jara tuniziano, kiun UEA invitis partopreni la 64an UK en Lucerno. Por la verkinto de la artikolo (Salah Jegham) montriĝis aparte interesa la fakto, ke Grine en Svislando estis invitita de la arablingva redakcio de Svisa Radio Internacia por intervjuo pri la Internacia Lingvo. Grine mem lernis Esperanton en 1972 de la franco Claude Martins, kaj li nun klopodas starigi movadan kernon en Tunizio. (Adreso: A.G., Zaouit-El-Arabe, Degache, Tunizio).


Instruistoj

- D-rino Lina Gabrielli, movada verkisto kaj eldonisto, gvidas Esperanto-kurson por 230 geinstruistoj en urbeto apud Ascoli Piceno, kie ŝi loĝas. Ankaŭ d-rino Gabrielli sentas grandan mankon de itala-Esperanta vortaro, kiu jam delonge komplete mankas en la movada libromerkato.

Premioj

- En la jam tradicia konkurso por la "Premio Simondetti" venkis en 1979 Paul Thomas el Germana Demokratia Respubliko per sia artikolo "La turka turdo". Tiu konkurso (por la plej bona teksto pri birdoj) okazos ankaŭ en 1980. Informojn petu ĉe: d-rino Lina Gabrielli, Via Luigi Mercantini 14, I-63100 Ascoli Piceno, Italio.
- Meze de decembro pasintjare, al Sven Alexandersson, vicprezidanto de la LKK de la 65a UK, estis transdonita la lingvopremio de Pacasocie de Stokholmo. Alexandersson estas malnova aktivulo en la sveda Esperanto-movado (jam antaŭ la Dua Mondmilito li estis sekretario de Sveda Esperanto-Federacio). Li aktivis ankaŭ internacie, precipe kiel faka kunlaboranto en Internacia Scienca Asocio Esperantista. La premio, kiun por 1979 ricevis Alexandersson, estas aljuĝata ĉiun trian jaron. Jam antaŭe ĝi estis kelkfoje aljuĝita al konataj skandinaviaj esperantistoj.

Dua bulteno



NE RESTIS loko en ĉi tiu numero por "Kongresa komuniko", kvankam novaĵoj pri la 65a Universala Kongreso en Stokholmo ne mankis. Ni menciis nur kelkajn el ili, antaŭ ol pli detale reveni al tio en nia aprila numero: Prof. d-ro Björn Collinder, mondfama specialisto pri la finugraj lingvoj, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, akceptis la rektorecon de la Internacia Somera Universitato dum la 65a UK. Pri la kongresa ĉeftemo – "Diskriminacio" – okupiĝas tuta taĉmento da homoj kaj pretigas ekstreme interesan programaron. La Bankedo kostos multe, ĉefe pro la ejo – la fama "Ora salono", kie okazas Nobel-premiaj ceremonioj. Aperis la Dua Bulteno en bela grafika vesto.

Persone

Wilson

- Antaŭa ĉefministro de Britio, Harold Wilson, kiu intertempe fariĝis kavaliro (nobela titolo), iam lernis Esperanton. Tiu informo aperis en *People*, angla semajna gazeto (eldonkvanto 3,8 milionoj da ekzempleroj), kiu precizigas, ke Wilson

konatiĝis kun la Internacia Lingvo jam en sia junaĝo, kiel skolto. Kvaŭ por emfazi ĉi tiun novaĵon, de TUCEG (Brita Sindikata kaj Kooperativa Esperanto-Grupo) venas informo, ke Wilson ĵus akceptis fariĝi unu el la 14 vicprezidantoj de TUCEG. Cetere, tiu tre aktiva brita agadgrupo dezirus kontakti esperantistojn, kiuj en aliaj landoj laboras sur la sama kampo. Bv. skribi al: TUCEG p/a R. Trevis, 78 Thorpelea Road, Egham, Surrey, Britio.

Oficiala Informilo

N-ro 533

NOVAJ KOTIZOJ POR BRAZILLO KAJ JAPANIO

Sekve al signifaj ŝanĝoj en la koncernaj kurzoj (inkluzive de oficiala devaluto en Brazilo), necesas reĝustigi la UEA-kotizojn por Brazilo kaj Japanio. La novaj tarifoj validas ekde la publikigo de ĉi tiu informo. Ili estas: brazilaj kruzejoj, MJ(-K) 400, MA(-K) 1 000, SA 600, Kto 300, SZ 2 000; japanaj enoj, MJ(-K) 2 400, MA(-K) 6 000, SA 3 600, Kto 1 800, SZ 12 000.

SOCIETO ZAMENHOF

FR GERM: 92 Martin Gründler; 93 Helene Hiebel. PORT: 94 Wilhelm Th. Oeste. BRAZ: 95 Delio Pereira de Souza. JAP: 96 Syozi Hosonuma. KAN: 97 Dorothy Hawley. NORV: 98 Olaf Mæland. NOV-

ZEL: 99 Desmond J. Langman. SVED: 100 Åke Blomberg. US: 101 F.J. Belinfante; 102 Hyman Ledeen; 103 Gertrude Novak; 104 James Parkerson; 105 George Rodenborn; 106 William Solzbacher. VENEZ: 107 Carlos Levay.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Argentino: A. Lopez Luna. Britio: W.J. Nesbitt. Nederlando: Teo Jung; G. Roorda. Usono: H. Ahmanson; A.E. Foster.

DONACOJ 1980 (Gld). ĝis la 31-a de januaro

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO: FR Germanio: Marie Laade 300,00. ELDONA FONDAĴO: Nederlando: E. van Dam 27,84.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 25,25. Nederlando: A.W. Treurniet 20,00; E.J. Woessink 10,00; S. v. Wijngaarden 100,00. Sumo ĉi-jara 155,25.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: I. Helsingius 56,10; A. Ratalahti 51,00. FR Germanio: Marie Laade 300,00; Fr. Liebl 68,12. Nederlando: F. Zeiler 55,00; Frisa Esp.-Rondo 45,00. Norvegio: O. Maeland

19,34. Diversaj malgrandaj 8,64. Sumo ĉi-jara 603,20.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: W. Heinrich 200,00. Kanado: Nekonato 221,87. Nederlando: F.H. Kat 25,00; J.A. Pinto de Sousa 21,48; H. Veenstra 400,00. Diversaj malgrandaj 10,48. Sumo ĉi-jara 879,19.

PATRONOJ DE TEJO: 12 C. Long, Britio. 13 J.A. Pinto de Sousa, Nederlando. 14 A. Mechelynck, Bel-

gio. 15 F. Swift, Nov-Zelando. 16 D.J. Langman, Nov-Zelando. 17 J.S. Douma, Nederlando.

PROPAGANDA KONTO: Diversaj malgrandaj 8,73.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: Germaine Wolff 1 000,00. Kanado: B. Salt 760,00. Sumo ĉi-jara 1 760,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

La membraro de UEA en 1979

Lando	AM	IM	Sume
Afganio	-	1	1
Albanio	-	1	1
Alĝerio	-	2	2
Antiloj nederl.	-	1	1
Argentino	311	67	378
Aŭstralio	130	121	251
Aŭstrio	321	63	384
Belgio	500	179	679
Bermudo	-	1	1
Bolivio	-	1	1
Brazilo	750	344	1094
Britio	797	327	1124
Bulgario	4100	108	4208
Ĉeĥoslovakio	1100	157	1257
Ĉilio	-	6	6
Ĉinio	-	7	7
Danlando	350	120	470
Ebura Bordo	-	1	1
Egiptio	-	2	2
Ekvadoro	-	2	2
Finnlando	400	237	637
Francio	703	560	1263
Ganao	-	1	1
Germana DR	500	30	530
Germanio, FR	986	458	1444
Greklando	?	14	14
Hinda Unio	-	9	9
Hispanio	337	148	485
Hongkongo	-	4	4
Hungario	3071	166	3237
Indonezio	-	3	3
Irako	-	2	2
Irano	-	8	8
Irlando	?	7	7
Islando	?	40	40
Israelo	200	53	253
Italio	1194	244	1438
Jamaiko	-	1	1
Japanio	1126	349	1475
Jugoslavio	?	169	169
Kamerunio	-	1	1
Kanado	174	87	261
Kenjo	-	2	2
Kolombio	-	21	21
Korea Resp.	241	36	277
Kostariko	-	3	3

Lando	AM	IM	Sume
Kubo	-	9	9
Kuvajto	-	2	2
Liberio	-	1	1
Luksemburgo	90	12	102
Madagaskaro	-	6	6
Malajzio	-	1	1
Malavio	-	1	1
Malto	45	1	46
Maroko	-	2	2
Maŭricio	-	1	1
Meksikio	105	22	127
Monako	-	2	2
Mongolio	-	1	1
Mozambiko	-	1	1
Nederlando	413	429	842
Nigerio	-	4	4
Norvegio	364	105	469
Nov-Zelando	135	71	206
Pakistano	-	5	5
Panamo	-	1	1
Papua Nov-Gvineo	-	1	1
Peruo	-	28	28
Pollando	4150	116	4266
Portoriko	-	1	1
Portugaliao	144	31	175
Rumanio	-	36	36
Salvadoro	-	1	1
Senegalio	-	2	2
Singapuro	-	1	1
Sirio	-	1	1
Soveta Unio	-	90	90
Srilanko	-	3	3
Sud-Afriko	38	18	56
Sudano	-	1	1
Svedio	1220	462	1682
Svislando	198	196	394
Tajlando	-	1	1
Tunizio	-	1	1
Turkio	-	1	1
Urugvajo	-	4	4
Usono	294	417	711
Vatikano	-	1	1
Venezuelo	21	16	37
Vjetnamio	-	3	3
Zairio	25	4	29
91 landoj	24533	6277	30810

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1978 KAJ 1979

Kategorio	1978	1979
Membro-Jarlibro	1040	1038
Membro-Abonanto	3859	3939
Dumviva Membro	980	983
Honora Membro	18	18
Juna M-Jarlibro	102	123
Juna M-Abonanto	216	176
Individuaj Membroj	6215	6277
Asociaj Membroj	18120	17908
Junaj As. Membroj	6708	6625
Membroj entute	31043	30810
Societo Zamenhof	221	226
Abonoj <i>Esperanto</i>	248	232
Kolektivaj abonoj <i>Eo</i>	2873	2178
Abonoj <i>Kontakto</i>	219	226
Kolektivaj abonoj <i>Kto</i>	-	150
Kotizoj entute	34604	33822

RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

Kvankam la nombro de la individuaj membroj iom kreskis en 1979, ĝenerala impresio estas la stabileco de la membraro de UEA. La plej okulfrapaj ŝanĝoj en la individua membraro estas gajno en Brazilo (+40), sed ankaŭ perdoj en Irano (-51; pro la revolucio kaj ĝiaj sekvoj) kaj Usono (-66; sendube pro la malplivalorigo de la dolaro kaj sekva altigado de la kotizoj). Mankas ankoraŭ la asociaj kotizoj el Slovakio, Greklando, Irlando, Islando kaj Jugoslavio, kune ĉ. 1.600. (Simila nombro mankis samdate ankaŭ pasintjare.) Pro komparaj celoj, la ĉi-supraj nombroj por 1978 estas laŭ la revunumero de marto 1979, ne la pli definitivaj el la Estrara Raporto. UEA nun havas anojn en 91 (en 1978 en 82) landoj.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 33

(pri la demando vidu
nian februaran numeron)

a. Aleksandro Zilbernik, aŭ Silbernik, (?? -1906) estis la patro de kvar filoj kaj kvin filinoj; la plej juna el tiuj ĉi, Klara, fariĝis la edzino de Zamenhof. S-ro Zilbernik kaj lia filino akordiĝis doni al Zamenhof parton de la doto de Klara antaŭ la edziĝa ceremonio, por ebligi la eldonon de la *Unua Libro*. Poste, la bopatro de Zamenhof helpis lin finance dum tiuj jaroj, kiam li ankoraŭ ne enspezis sufiĉe da mono kiel kuracisto por vivteni sian familion.

b. Wilhelm Heinrich Trompeter (1839-1901) estis adepto de Volapuko. Li aliĝis al Esperanto en 1888, kaj en 1890 fondis en Schalke, Vestfalio (Germanio), unu el la plej fruaj Esperanto-grupoj. Proprakoste li eldonis Esperanto-lernilojn kaj propagandaĵojn. Lia subvenciado de *La esperantisto* daŭris tri jarojn.

c. Vladimir Aleksandroviĉ Gernet (1870-1929) esperantistiĝis en 1890. Krom sia redakta laboro, li tradukis *Fantomoj* de Vl. Korolenko (1896) kaj kune kun A. Kofman *Pentraĵoj el vojaĝo* de H. Heine (1897). Li esperantigis ankaŭ la faman leteron pri la deveno de Esperanto, kiun Zamenhof sendis al Nikolaj Borovko. Alia projekto de Gernet

estis la eldonado de la libroserio "Biblioteko de la Lingvo Internacia Esperanto".

ĉ. Émile Javal (1839-1907) estis eminenta oftalmologo, eks-parlamentano kaj membro de la Franca Akademio pri Medicino. Unu el la celoj de lia fervora laboro por Esperanto estis akiri oficialan agnoskon de la lingvo en Francio, kaj tiurilate li uzis sian personan influon. Li testamentis kapitalon por certigi la funkciadon de la Esperantista Centra Oficejo.

d. Hector Hodler (1887-1920), la filo de Ferdinand Hodler, la konata svisa pentristo, estis lerneja-amiko de Edmond Privat en Ĝenevo, kie ili kunlaboris en redakta kaj administra laboro por Esperanto. Aĉetinte la revuon *Esperanto* de Paul Berthelot, li fariĝis ĝia dua redaktoro en 1907. La sekvan jaron li fondis Universalan Esperanto-Asocion.

DEMANDO 34

(la respondo aperos
en nia aprila numero)

La ĉi-monata demando temas pri nombroj formantaj parton de libro-titoloj en Esperanto— originalaj verkoj, beletraj tradukaĵoj, prilingvaj studoj, biografioj, ktp. Kiam vi finlistigis ĉiujn titolojn, adiciu la nombrojn el la titoloj. Se vi bone faras vian literaturan kaj aritmetikan lecionojn, vi trovos, ke la sumo estas 2181.

a. La tria originala Esperanta poemaro fare de nuntempa poeto el Skotlando enhavas longan poemon kaj ankaŭ unuaktan dramon.

b. Nederlanda membro de la Akademio de Esperanto verkis detalan gramatikan analizon pri la korelativoj en Esperanto: "tia/kia" kaj "tiom/kiom".

c. E. Lanti, la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), espe-

Kiu volas subvencion?

INSTITUCIO HODLER 68 invitas novajn subvencipetojn por konsidero en ĝia jarkunveno en majo 1980. La Institucio ekzistas, laŭ sia statuto, por subvencii unuavice UEA sed ankaŭ, laŭeble, aliajn Esperanto-organizaĵojn, verkistojn, eldonistojn, esplorantojn k.a. Subvencipetoj devas atingi Institucion Hodler 68, p/a Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, plej malfrue ĝis la fino de aprilo ĉi-jare. Ili klare priskribu (maksimume sur unu paĝo) la celon kaj bezonon de la subvencio kaj la sumon petatan.

rantigis verkojn de mondfama franca filozofo, verkisto kaj historiisto.

ĉ. Esperanta poeto el Sudafriko verkis longan poemon dividitan en sekciojn, kies titoloj estas elementoj de la naturo.

d. En Hungario estis publikigita infana rakontlibro pri reĝidoj, kiuj loĝas en mirinda palaco.

e. Ankoraŭ unu eldonaĵo el Hungario estas raport-romano pri vivo en vilaĝo kun fono de la nuntempa politika situacio.

f. Antologio de originalaj rakontoj en Esperanto enhavas novelojn de 29 aŭtoroj de la jaroj 1898-1961.

g. Okaze de jubileo de pionira sveda esperantisto, liaj amikoj prizorgis la eldonon de albumo de fotografaĵoj kaj movad-historiaj informoj.

ĝ. Nederlanda esperantisto verkis resuman skizon de la literatura evoluo de Esperanto dum iom pli ol duonjarcento da publika vivo.

h. Kristana romano verkita de mediumo en sudamerika lando estis eldonita de spiritisma organizaĵo.

PRETERE DIRITE, kion vi fakte nun faras kun viaj jarkolektoj de la revuo? Eĉ se vi mendis lastatempe la specialan bindilon por la revuo *Esperanto*, ni ne povas liveri ĝin, ĉar ĝi elĉerpiĝis. Ĝuste tial ni bindigis pli da jarkolektoj de 1979. Mendu do tuj vian ekzempleron ĉe UEA. Prezo: 20,00 gld. (plus la refreno pri imposto kaj sendokostoj).

*Se vi ankoraŭ NE
pagis vian abonojn
por 1980, vi riskas ne
ricevi la aprilan nu-
meron de la revuo!?*

VESELIN DAMJANOV kantas en esperanto

Tiu bela gramofondisko estis havebla por antaŭmendintoj dum la 63a UK en Varno. Fine, nun ĝi estas havebla ankaŭ por la aliaj klientoj de la Libroservo de UEA, kiu aĉetis la tutan restantan stokon kaj por la samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj donas 33-procentan rabaton. Estas riske atendi! Mendu tuj!

VESELIN DAMJANOV KANTAS EN ESPERANTO. Pianakompano de E. Komarov. Sofia: Balkanton, 1978. 30cm. 33t/m, duflanka, stereofona. BOA 2180. Dek du kantoj en profesia interpreto de esprimriĉa baritono. Prezo: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu noti, ke ni ne donas ripetrabaton por anoncetoj.

Naturistoj/Nudistoj, aliĝu al INOE, legu nian gazeton, renkontiĝu kun ni! Pli ol 200 samcelanoj atendas vin! Inf. kaj aliĝilon petu de: H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Per tajpitaj leteroj, kun spertaj esperantistoj, deziras korespondi: sinjoro Stepanow, 17 Chandler Road, Noble Park, 3174 Victoria, Aŭstralio.

25-jara profesoro pri biologio deziras korespondi tutmonde, por interŝanĝi ideojn, bildkartojn, mapojn, biletojn, monerojn, revuojn ktp.: Norberto Mollo, Asamblea 480, RA-6100 Rufino, Santa Fe, Argentino.

Ŝparu monon. Mendu viajn anglalingvajn librojn rekte de Anglujo. Skribu al: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs.

Senpagan ekzempleron de turisma revuo *La Migranto* petu de Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık sok. n-ro 23, Ortaköy-İstanbul, Turkio.

48-jara franca dommastrino, ŝatanta la vojaĝojn, serĉas proksimume samagajn samideaninojn por korespondi kaj eventuale interŝanĝi vizitojn en okcidenteŭropaj landoj: s-ino A. Dupayrat, 1820 route de Genève, F-01700 Miribel, Francio.

Dum somero mi planas viziton al Indonezio, Singapuro, Jokjakarto kaj Semarango. Bv. skribi al: inst. Risto Kiviluoto, Östergatan 17, S-151 43 Södertälje, Svedio.

Dua Eŭropa Kongreso pri Hipnozo en Psikoterapio kaj Psikosomata Medicino, majo 1980, Dubrovnik (Jugoslavio). Partoprenonto deziras havi esperantistan, sciencan kontakton. Bv. skribi al d-ro Hans Eichhorn, Mellenseestr. 1, DDR-1136 Berlin, Germana Dem. Respubliko.

Leterojn, bildkartojn, poŝtmarkojn, gazetojn, librojn ktp. deziras interŝanĝi tutmonde s-ro Amaro Pinangé Soares, Caixa Postal 421, BR-50000 Recife, Brazilo.

Poŝtmarkoj valoras oron: Ofte tra la pasinta jaro ni petis vin sendadi uzitajn poŝtmarkojn al UEA. Kiel grava tio montriĝis, pruvu al vi la informo, ke en 1979 UEA enkasigis 4 700,00 guldenojn el la poŝtmarkaj vendoj. Komparcele ni diru, ke pasintjare la tuta kapitalo de la Fondaĵo Azio-Afriko sumis eĉ malpli. Do, la poŝtmarkoj estas bonvenaj. Dankon!

La modernigita ortografio (sen ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ; kun q, w, x, y) ebligas akceli la ĝeneralan tutmondan agnoskon, instruadon kaj uzadon de nia lingvo. Informas: O.E.O., 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse.

Invalida samideano deziras interŝanĝon de poŝtmarkoj. Respondo gar. Herman Hoogland, Keizerstraat 40, 3135 CV Vlaardingen, Nederl.

Seriozajn korespond-geamikojn, pri lingvan helpon, legolibrojn, gazetojn k.s. bonvenigus grupo da komencintoj en Okcidenta Bengalio, ŝtato en Hinda Unio. Kontakteblas pere de: s-ro Swaraj Chakravarty, 102/1-C Karaya Road, Calcutta 700017, Hinda Unio.

Kaset-interŝanĝojn deziras Ŝerbruka Esperanto-Societo, C.P. 2362, Succ. Jacques-Cartier, Sherbrooke, Québec, Kanado, J1J 3Y3. Sonbendigu sur eta kaseto pri vi, via loko, viaj aktivecoj aŭ kia ajn temo kaj sendu aerpoŝte; ni reciprokos.



Instruisto el Peruo, 33-jara fraŭlo, edziĝcele serĉas korespondantinon (Esperante aŭ hispane, ĝis 35-jaran) el la landoj de la okcidenta Eŭropo. Adreso: Pedro I. Núñez Díaz, Jirón Eten n-ro 285, Cajamarca, Peruo, Sud-Ameriko.

Oficistino 25-jara deziras korespondi tutmonde pri kutimoj, beletro, pentroarto: Vera A. Vasiljovskaja, ul. Volzskaja d. 2/10, kv. 91, SU-410002 Saratov, Soveta Unio.

Laktistoj kaj laborantoj en lakta industrio havos sian internacian kongreson en 1982 en Soĉi, Soveta Unio. Skribu al la tiea E-grupo ĉe la loka lakto-entrepreno: Esperanto-grupo, str. Gorkogo 87, Moloĉnij Kombinat, SU-354000 Soĉi, Soveta Unio. Klubaj koruso kaj muzikensemblo deziras samfakan korespondadon kaj interŝanĝon de kantoj kaj muzikaĵoj. Koruso "Laktisto", Poŝtkesto 264, SU-354054 Soĉi, Soveta Unio.

Nova E-Klubo en Hinda Unio kun danko akceptus ĉiaspecajn Esperantajn eldonaĵojn. Helpu per sendo de libroj kaj revuoj al: Ravindranath Dubey, Principal's Residence, Malharasham HSS, Tilak Path, Indore (M.P.), 452002 Hinda Unio.

Se ĉiuj, kiuj tion volas, povus pagi sian kotizon, UEA HAVUS DUOBLE PLI DA MEMBROJ!

Fondaĵo Canuto estas praktikado de solidareco kaj amikeco

Eble ankaŭ vi povas helpi al unu el tiuj esperantistoj, kiuj ne havas eblecon sendi la membrokotizon pro transpagaj malfacilaĵoj!? Pagante vian propran kotizon, sendu donacon de unu membrokotizo al FONDAĴO CANUTO de UEA. Vi povas indiki la nomon de persono, kiun vi volas membrigi, aŭ lasi la elekton al la Centra Oficejo de UEA.

KORAN ANTAŬDANKON nome de nova membro de UEA pere de FONDAĴO CANUTO!

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN
UNIKAN PERIODAĴON EN LA
INTERNACIA LINGVO?

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4 — riĉe ilustrita
11 kajeroj jare

Jara abono: 49,50 gmk aŭ 880,- b.fr.
La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2100 Schoten. Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO", petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/16

Ĉiu ajn korekto aŭ pli alta justeco politika, kiun la kutimaj, tiufake laikaj cerboj pretendas akiri pere de lukto, estas plena stultaĵo. En ĉiu ajn lukto, jam de jarmiloj, la plej granda sovaĝeco venkas. En la batalo kun ĝi, eĉ la malsuperaj perforto kaj perfido ĉiam malvenkis en la ĝangalo, same kiel la supera saĝo. Sed hodiaŭ, por savi la mondon de ĝia kolose erara vojo, la aktuala kuro al memekstermo, nepre necesas turni sin tuj al la helpo de supera saĝo, tuj ĉesante fidi al la gloroj kretenaj de la pasinteco politika. Al la savo, do, inundante tuj ĉiujn mensojn per la sava pensmaniero SUPERDEMOKRATIO!


♦ Esp/17

La demokratio nuntempa baziĝas sur erara fundamento. La DOK/1 de la M/I klarigas, psikologie, tiun eraron. Ĝi montras, ke, kiom da vizaĝoj, tiom da malsame strukturitaj intelektoj. Krome, ke unuopaj intelektaj individuecoj taŭgas al malsamaj roloj, kiuj estas necesaj por funkciigi la homan orkestron. J.J. Rousseau havis nur rudimentan intelektan vidpovon, kiam li aplombe asertis, ke ne ekzistas laŭ la naturo diferenco inter homo kaj homo. Tiam li ne

rimarkis la naturajn diferencojn nuance, la apartan diferencon de individuo disde individuo de la sama speco. Individueco, cerba aŭ vizaĝa, estas ĉiam unika.

♦ Esp/18

La komitatoj (maksimume dekpersionaj) por nia savo el la regno de la homa stulto, kiu estas la malica aŭtoro de la nuna konkuro de la homaro al la memekstermo, estos dissemataj ĉie sur la terglobo. Iliaj taskoj estas: A) Kunveni por interkonsultiĝi almenaŭ ĉiumonate. B) Individui surloke, kie mono por funkciigi la M/I estas varbebla, kaj instigi la interatojn fari la donacojn senpere al M/I. C) Varbi la adresojn de nur PINTAJ izoluloj kun originala pensmaniero en la porpaca kampo, kaj sekve liveri ilin al M/I. Tio estas multvalora servo ne nur al si mem, sed ankaŭ al siaj karuloj, al siaj amikoj, al la HOMARO, samkiel al la donacinto mem.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18
I-40065 PIANORO, ITALIO

FINNLANDAJ STUDSEMAJNOJ 1980

Studsemajno en Alta Nordo:

9.-14.6.1980, Inari

Studsemajno apud Lagobordo:

19.-27.7.1980, Vääksy apud Lahti

Studotagoj Finnlandaj-Svedaj:


11.-13.8.1980, Wik apud Uppsala

Ĉi-jare preparu vin en Vääksy por Rauma (TEJO) aŭ por Stokholmo (UEA)!

Petu informo-paperojn de:

INTERNACIA STUDCENTRO,
SF-17 300 VÄÄKSY, FINNLANDO

Nun en nova vesto:



ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Red. Auld kaj Rossetti

319p. broŝurita 13,50 gld.

ISBN 92 9017 003 4

GRANDA ANTOLOGIO
DE GRANDA LITERATURO

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

fama sudamerika romano en la traduko de F. de Diego.
Caracas: VEA, 1975. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld.

UEA estas nun la ĉefdistribuanto de la Esperanta eldono.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo kaj riĉigis nian lingvon per libro kies ĝuado en Esperanto ne estas sub tiu de la legado en la hispanlingva originalo. Kelkloke la estetika ĝuo estas pli diafana kaj senpera en la tradukita teksto, ol en la originala, dank' al la brava manipulado de la latentajoj en Esperanto kaj al la suverena agordado de ĉi ties esprimrimedoj." Juan Régulo

Ĉu vi valoras la libron?



Du mil homoj jam aĉetis la libron, ĉar...
"Ĝis plibonigenda reeldono aŭ apero de Enciklopedio, ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." M. Duc Goninaz

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Eskapu al pli malferma turismo

Kiam vi ferias, vi ne volas loĝi en valizo. Hoteloj kaj planitaj bus-ekskursoj povas ne plaĉi. Por ekoni landon, necesas eskapi la mondon de kelnero kaj turistgvidantoj. Jen pli kontentiga formo de turismo: PASPORTA SERVO DE TEJO. Ĝi estas gastiga servo por Esperanto-parolantoj. Ĝus aperis la listo de gastigantoj por 1980 (kun pli ol 360 adresoj en 48 landoj), kie aliĝintoj povas senpage tranokti. Tiel oni renkontas eksterlandanojn en iliaj propraj hejmoj.



Pasporta Servo: J.M. Cash, 9 rue Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francujo. Aliĝo kostas 15 FF (1980), pageblajn al ĝirkonto: Paris - 25 426 58 P - J.M. Cash. La adresaro aĉeteblas ankaŭ ĉe la Libro-servo de UEA. La prezo tie, kiu inkluzivas aliĝon al la Servo, estas 7,50 (por Ned. 7,80) gld.